

(EN ESPERANTO)

ISSN 0032-4361

3

1994

中國報

EL POPOLA

ĈINIO





Papago kaj persikfloroj

Foto de LIU SIGONG

INTER NI

Pri filatelo, klasika literaturo kaj filozofio en Ĉinio

Estus tre bone, se la redaktoroj aperigus artikolojn pri ĉinaj poŝtmarkoj, kiuj vekas egan atenton de filatelisto-esperantistoj. Aŭtoro povus

skribi ne nur pri nunaj ĉinaj poŝtmarkoj, sed ankaŭ pri datiĝo kaj evoluo de pm. en Ĉinio, pri la planado kaj emisiado de pm., ĉu ekzistas filatelista societo, ĉu oni kutimas aranĝi ekspoziciojn ktp?

KRISTIÁN JOZEFO
(Slovakio)

En Ĉinio troviĝas multaj filatelistoj kaj ekzistas la Ĉina Filatelista Federacio. En la proksima estonteco fondiĝos asocio de filatelisto-esperantistoj de Ĉinio. Filatelado en Ĉinio estas tre vigla, ekz. ofte okazas ekspozicioj de poŝtmarkoj. Krome oni eldonas revuojn "Filatelo" (ĉinlingva) kaj "Ĉina Filatelo" (angla-lingva) aboneblajn ankaŭ por eksterlandanoj. EPĈ aperigos artikolojn pri la evoluo kaj la nuna stato de la ĉina filatelo.

La Red.

Mi multe preferas ĉinajn poemojn. Kial vi ne plu prezentas rubrikon pri antikvaj poemoj kaj klasika literaturo kaj filozofio ĉinaj?

CLARY FRANCOISE

(Francio)

En la pasintaj jaroj ni konigis la ĉinan antikvan literaturon (inkluzive klasikajn poemojn) en la rubriko "Ĉina Literaturo" kaj famajn ĉinajn antikvajn filozofojn kaj iliajn teoriojn en la rubriko "Antikvaj Ĉinaj Filozofoj". En la rubriko "Inter Ni" de n. 3, 1993, ni konigis bazajn sciojn pri ĉinaj klasikaj poemoj kun fama klasika poemo kiel ekzemplo. Ĉi-jare ni lanĉis novan rubrikon "Ĉina Kulturo" por konigi al la legantoj ĉinajn literaturon, historion kaj filozofion. Kaj la rubriko "Sentencoj de Filozofoj" efektive celas ĉinan klasikan filozofion, kvankam ĝi estas mallonga, tamen signifoplena. "Taktiko de Sun Wu" en ĉi numero temas pri la milita teorio de Sun Wu, fama antikva strategiisto. Iasence lia teorio estas filozofio.


La Red.

ENHAVO

- | | |
|--|--|
| <p>2 <i>INTERNI</i></p> <p>4 Pri la konstruado de ŝoseoj en Ĉinio</p> <p>6 Bioinĝenierio en Ĉinio</p> <p>8 Gravaj konstruoj en Tibeto</p> <p>10 Refoje en Pekino</p> <p>12 <i>VOĈO DE E-ISTOJ:</i>
Esperantista hobia</p> <p>14 <i>SUR NIA LIBROBRETO:</i>
Kristalo de la racia konsiderado</p> <p>15 <i>KORESPONDI DEZIRAS</i></p> <p>16 <i>POR KOMENCANTOJ:</i>
Amiko pro telefono</p> <p>17 <i>ESP-NOVAĴOJ</i></p> <p>20 <i>ĈE YANGZI-RIVERO:</i>
Prosperas Suzhou, Wuxi kaj Changzhou</p> <p>24 Akvo, pli kara ol oro</p> <p>25 <i>EKONOMIE:</i>
Por allogi eksterajn investantojn</p> <p>26 <i>SUR SCENEJO:</i>
Ĉinaj akrobataĵoj</p> <p>28 Brila perlo en profunda montaro</p> <p>29 <i>BELA ĈINIO:</i>
Longdraka festeno de hani-a montvilaĝo</p> | <p>32 Ĉinaj sciencistinoj</p> <p>36 Kultura monumento de Ĉinio</p> <p>38 <i>ĈINA KULTURO:</i>
Taktiko de Sun Wu</p> <p>40 <i>MEM PROVU</i></p> <p>40 <i>SENTENCOJ DE FILOZOFOJ:</i>
Sentencoj de Xunzi</p> <p>41 <i>EL ĈINAJ GAZETOJ</i></p> <p>42 Amikeco inter homoj kaj tigroj</p> <p>43 <i>POR VIA SANO:</i>
Kuraco de junula miopeco</p> <p>44 Ĉinaj korbopilkinistinoj en progreso</p> <p>48 <i>KURANTAJ AFEROJ</i></p> <p>50 <i>METIARTAĴOJ:</i>
Bambuaj plektaĵoj de Shengxian-gubernio</p> <p><i>SUR LA KOVRILO:</i>
Antikva urbo en printempo</p> <p style="text-align: right;">Foto de Liu Sigong</p> <p>2 Papago kaj persikfloroj</p> <p>18 En neĝkovrita forstejo</p> <p>34 Ŝe-oj en orienta Fujian</p> <p>46 Sporta lernejo en Pekino</p> <p><i>SUR LA DORSKOVRILO:</i>
En taj-a vilaĝo</p> |
|--|--|

LOKOJ MENCIIITAJ EN ĈI TIU NUMERO

1. Suzhou (p. 20)
2. Wuxi (p. 20)
3. Changzhou (p. 20)
4. Tibeta Aŭtonoma Regiono (p. 8)
5. Shengxian-gubernio (p. 50)
6. Ailao-montregiono (p. 29)
7. Guangxi-a Ĝuang-nacia Aŭtonoma Regiono (p. 4)



Pri la konstruado de ŝoseoj en Ĉinio

EKDE la 90-aj jaroj, por pli frue fini la troŝarĝitecon de ŝoseoj Ĉinio rapidigis la konstruadon de ŝoseoj, ke ĝi eniris en novan epokon.

“KONSTRUI ŜOSEOJN POR RIĈIĜI”

En 1906 aperis en Guangxi (Gŭangŝji) la unua ŝoseo de Ĉinio. En 1949, kiam fondiĝis la Ĉina Popola Respubliko, Ĉinio havis ŝoseojn de 81 000 km. En la postaj 30 jaroj pli kaj pli grandiĝis la totala longo de ĉinaj ŝoseoj. En la komenco de la 90-aj jaroj ĝi atingis 1.057 milionojn da km.

Tamen, la totala nivelo de ĉi-

naj ŝoseoj ne nur estis multe malpli alta ol tiu de la evoluantaj landoj, sed eĉ multe distancis de tiu de iuj disvolviĝantaj landoj. Precipe, kiam pli profundiĝis la reformado kaj pordomalfermo de Ĉinio, la ŝoseoj ne nur ne povis adaptiĝi al la disvolviĝo de la nacia ekonomio, sed eĉ katenis ĝin.

En Shanxi, karba provinco de Ĉinio, ofte vidiĝis, ke sur la ŝoseoj vico post vico da aŭtoj ŝarĝitaj per karbo antaŭeniras tre malrapide vojŝtopiĝo. Tial iuj karbominejoj devigite limigis sian karboproduktadon.

En 1988, riĉe rikoltiĝis bananoj en Guangxi. Pro manko de ŝoseoj sufiĉe multe da bananoj

putriĝis.

La veturado de Kantono al Shenzhen (Ŝenĝen) per trajno bezonas du horojn, tamen tiu per aŭto 7-8 horojn.


Antaŭ multe da jaroj la kamparanoj en la izolitaj lokoj de Ĉinio la unuaj esprimis sian deziro “konstrui ŝoseojn por riĉiĝi”. Nun la voĉo vekis la simpatio en la tuta lando.


ALLOGO DE EKSPRESA ŜOSEO

En 1991 la antaŭe senfama provinco Shandong elstaris per la nacia enspezo plej multa en la tuta lando. La rapida konstruado de ŝoseoj estis grava kaŭzo de la riĉiĝo. Tial rapide cirkulis en Ĉinio la diro “Malgranda vojo iom riĉigas, la granda multe riĉigas, kaj ekspresa ŝoseo rapide riĉigas.” Tiel aperis la unua ekspresa ŝoseo de Ĉinio.

La nomita ŝoseo etendiĝas de Pekino al Shijiazhuang (Ŝiĝjaĝŭang), de kie longa ŝoseo iras suden. La origina vojparto komenciĝanta de Pekino estis larĝa je 7-9 m. En 1986, ĉiutage sur ĝi kuris proksimume 15 000 aŭtoj kaj en la kulmino 1 500 ĉiuhore. Tiam ofte okazis trafikaj akcidentoj. Pro tio, la pekina magistrato decidis poperiode konstrui la Pekin-Shijiazhuang-an Ŝoseon. En 1991 finkonstruiĝis kaj ekfunkciis la ekspresa ŝoseo. Tio metis la finon al la historio, en kiu Ĉinio ne havis ekspresan ŝo-

SKEMA MAPO DE ŜOSEOJ





Aŭtovoja trefkruciĝo en Pekino



Sur la ekspresa ŝoseo inter Hefei kaj Nankino

seon.

Ekspresaj ŝoseoj donas multe da profito. La poste konstruita Pekin-Tianjin-Tanggu-a Ekspresa Ŝoseo, akcelis la formiĝon de la zono de alt-teknikaj industrioj. Laŭ la ekspresa ŝoseo de Jinan (Ĝĵinan) al Qingdao (Ĉingdaŭ) aperis ia ekonomia koridoro de Shandong. La ekspresa ŝoseo de Shenyang al Dalian estas honorita kiel "ora vojo", kiu donas altan profiton. Tiuokaze multaj provincoj, sekvante ilian ekzemplon, rapidigis sian konstruadon de altklasaj ŝoseoj. En la jaroj 1988-1992 la nombro de novaj unuaklasaj ŝoseoj egalas al 113.7% de la totala nombro de la ŝoseoj konstruitaj antaŭ 1988. La konstruado de duaklasaj ŝoseoj komenciĝis de nulo kaj estis konstruitaj 2 000 km. Nun en 18 provincoj, aŭtonomaj regionoj kaj municipoj de Ĉinio estas konstruataj aŭ konstruotaj ekspresaj ŝoseoj. Kiam finiĝos la konstruado de la ŝoseo al la gubernio Medo en Tibeto, tiam ĉiuj gubernioj de Ĉinio estos atingeblaj per ŝoseoj.

KONSTRUADO DE ARTE- RIOJ

En la pasintaj jaroj la konstruado de ŝoseoj en Ĉinio ne nur iris rapide, sed ankaŭ plialtigis la kvalito de ŝoseo.

Post kelkara funkciado la taluso de la ŝoseo de Qinghai al Tibeto sinkis. La vojkonstruantoj komencis rekonstrui la ŝoseon. La

ĉefaj malfaciloj por ili estis alta situo kaj malbona klimato. En la areo de Kunlun ĝis Tanggula-montoj kontinue neĝis, kio malfaciligis la konstruadon. La vojkonstruantoj fosis tunelon en neĝtago kaj pavimis vojsurfacon en suntago. Nun glate iris la unuaperioda konstruado, kiu laŭplane finiĝos en tri jaroj.

Laŭ projekto, la triaperioda konstruado de la Pekin-Shijiazhuang-a Ekspresa Ŝoseo bezonis 18 monatojn, sed fakte oni uzis nur naŭ monatojn. En la konstruado verŝiĝis 50 000 kubmetroj da betono. Ĝenerale, 28 tagojn post la verŝo betono tute kondensiĝas. Tamen, la laboristoj uzis nove inventitan kondensigilon, tiel ke tri tagojn post la verŝo la betono fariĝis taŭga por uzi. Plie, oni aplikis plej avangardajn instalaĵojn de la mondo. Tio multe mallongigis la konstruadon kaj plialtigis la kvaliton de la ŝoseo.

La konstruado de la ŝoseo komenciĝis en 1986 kaj finiĝis en 1991. Pro manko de mono la konstruado prokrastiĝis. Tio montris, ke monrimedo estas ŝlosila ĉenero por ŝosekonstruado. Sub tiu kondiĉo, anstataŭ la asignado de la ĉina registaro mem, oni kolektas monon el registaro, grupoj kaj individuoj. Tio jam donis bonan efikon. En Shandong kuras multaj ŝoseoj kaj aŭtoj. Oni praktikas la principon kolekti aŭte-imposton por ŝoseoj, t.e., rekvizi aŭto-imposton por ripari

kaj konstrui ŝoseojn. La alia grava rimedo estas kredite preni monon de la Internacia Financa Organizo kaj la ŝtato. Nun la kredita monsumo estas ĉirkaŭ 1.7 miliardoj da usonaj dolaroj sufiĉaj por konstrui 7 000 km da ŝoseoj. Aliflanke, tio vidigas la ŝanĝiĝon en konceptoj de ĉinoj, nome rigardi ŝoseon kiel varon. En Pekino kaj aliaj lokoj funkcias ŝosea investa kompanio, kiu respondecas pri la konstruado, administrado kaj redono de kredito. El tio aperis nova vojo de reformado de la ĉina trafika investo.

Kiam la ĉina ŝosekonstruado rapide progresis, ministro de la Ĉina Trafika Ministerio s-ro Huang Zhendong anoncis, ke en la venontaj ok jaroj oni koncentros siajn fortojn por konstrui kvar ŝoseojn interligantajn la sudon kaj nordon, la orienton kaj okcidenton de Ĉinio. Ili estos la ŝoseoj de Tongjiang (Tongĝĵang) en Heilongjiang al Sanya en Hainan, de Pekino al Zhuhai en Guangdong, de Lianyungang en Jiangsu al Horgos en Xinjiang (Ŝingĵang), kaj de Ŝanhajo al Chengdu. Ili, kun la totala longo de 14 500 km, trapasos pli ol 20 provincojn, aŭtonomajn regionojn kaj municipojn, kaj ankaŭ pli ol 100 grandajn kaj mezgrandajn urbojn. Tio sendube havos gravan signifon por la disvolviĝo de la nacia ekonomio kaj la socio de Ĉinio. ■

Bioinĝenierio en Ĉinio

BIOINĜENIERIO estas nova scienca fako rapide disvolviĝanta. Ĝi estas destinita por studi pri kombino kaj malkombino de ĉeloj de mikroboj, plantoj kaj animaloj, kun la celo produkti deziratajn varojn. Bioinĝenierio estas strikte rilata al la homa vivo kaj ekonomia disvolviĝo, tial la mondaj biologoj dediĉas grandan atenton al ĝia esplorado. En tiu kampo ĉinaj sciencistoj jam rikoltis mondnivelajn fruktojn.

Por studi la originon de la vivo, sciencistoj de la mondo faris penan laboron dum longa tempo. En 1928 germanaj sciencistoj kreis sintezan ureon kaj ŝanĝis neorganikan substancon en organikajon. Post tio, en 1955 ili havigis al si la konon pri la kemia strukturo de insulino, speco de proteino, la plej simpla materia

fundamento de la vivo. Tamen ili ne sukcesis interligi multe da aminoacidoj.

En 1958 ĉinaj sciencistoj la unuaj komencis scienc-esploran temon sintezi insulinojn kaj de tiam ili estas inter la unuaj lokoj ĉikampe. Jam en la sekvinta jaro ili faris malkombinon kaj denovan kombinon de la peptidaj ĉenoj A kaj B, kiuj estas konsistigaj substancoj de la natura insulino, sukcese sintezis kaj malkombinis la naturan insulinojn kaj elfaris sintezan kristalan insulinojn.

Septembre de 1965 Ĉinio unuafoje elfaris sintezan insulinojn. Tio markis, ke la homoj faris gravan paŝon antaŭen por koni la originon de la vivo kaj malkovri ĝian misteron. En la scienc-esplora praktiko Ĉinio elkulturis grupon da altnivelaj sciencistoj kaj metis firman bazon por la plua esplorado.

En la lastaj jaroj la esplora grupo gvidata de Tang Jianguo (Tang Ĝjangŭo), vicprofesoro de la biologia fakultato de la Pekina Universitato, elkulturis homan insulinojn kun natura konsisto kaj biologia aktiveco per gena inĝenierio. Tio estas grava progreso en la esplorado pri la gena inĝenierio de la homa insulino.


Biologia tekniko estas grava konsistiga parto de la altaj teknikoj de la hodiaŭa mondo. Ĝia apliko en medicino, agrikulturo, forstokulturo, brutobredado, fiŝbredado, media protektado, manĝaj-prilaborado, kemia industrio, metalurgio k.a. multe akcelas la disvolviĝon de la produktaj fortoj kaj donas grandan helpon por solvi gravajn problemojn pri homa sano, manĝaĵoj, energio, riĉfontoj kaj media protektado.

La unua biologia altteknika produktaĵo, kiun Ĉinio faris, estas

Eksperimento por mortigi fiinsektojn sur kotonujo



En biologia laboratorio de la Pekina Universitato



interferino de la gena inĝenierio de la homa tipo α . La klinika eksperimento pri 350 kazoj farita en pli ol 20 hospitaloj montris, ke la nomita interferino estas efika por kuraci pli ol 30 virusajn malsanojn. Post la sankcio de la ĉina registaro oni nun grandkvante produktas kaj vendas altteknikan vakcinon — vakcinon de la gena inĝenierio kontraŭ hepatito B. Nun Ĉinio havas la eblon produkti vakcinojn por kuraci milionon da malsanuloj. La klinika eksperimento pruvis, ke ricevinte la inĵektadon de tia vakcino, ĉiuj infanoj, suferantaj de hepatito B, akiris antikorpon. 20 normoj de la vakcino atingis internacian nivelon.

La Ŝanhaja Centro de Biologia Inĝenierio sub la Ĉina Akademio de Sciencoj kaj la Harbina Veterinara Instituto sub la Ĉina Agronomia Akademio kune elfaris tri specojn da gen-inĝenieriaj vakcinoj kontraŭ lakso de junaj brutoj. La eksperimento pri 100 000 porkinoj kaj miliono da porkidoj montris, ke la vakcino povas rimarkinde malpliigi la mortokvanton de porkidoj suferantaj de lakso. En 1989 la Instituto de Kresko sub la Ĉina Akademio de Sciencoj ekstraktis genon de kreska hormono el la banko de porkaj genoj. Post trijara penado en 1989 la Citologia Instituto de Ŝanhajo enigis la genon de supraĵa antigeno de la viruso de hepatito B (HBsAg) kaj tiun de la homa kreska hormono en la fekundigitan ovon de kuniklo kaj akiris la unuan kuniklon kun transformitaj genoj, tiamaniere oni havigis al si novan teknikon de bonspeciigo de brutoj.

En Ĉinio la esplorado pri embria inĝenierio de brutoj komenciĝis en la 70-aj jaroj kaj rimarkinde progresis en la 80-aj jaroj. Nun ĝi sukcesis en eksperimento pri ŝafo, laktobovino, laktokapri-
no, porko kaj kuniklo. En la lastaj jaroj la tekniko de embria transplantado pli kaj pli progresis. Ni

prenu bovon kiel ekzemplon. Ĉiu bovo povas doni 5-9 uzeblajn embriojn. Meznombro 50% de la transplantitaj freŝaj embrioj kaj 40% de la frostigitaj povas embriiĝi. Koncerne embriotomion, la Nordokcidenta Agronomia Universitato de Ĉinio en 1986 akiris la unuan aron da duonembriaj bovidoj. En 1987 la Brutobreda Instituto sub la Ĉina Agronomia Akademio kaj la supre menciita universitato akiris la unuan aron da duonembriaj ŝafidoj kaj ĝemelaj ŝafidoj. En 1989 la Genetika Instituto sub la Ĉina Akademio de Sciencoj elkulturis kvaron-embrian bovidon. En 1990 la Xinĵiang(Ŝingĵang)-a Brutobreda Akademio elkulturis kvaron-embrian ŝafidon. Ĉinaj sciencistoj elkulturis ankaŭ tubajn kuniklon, bovon, ŝafon, porkon kaj kapron pere de eksterkorpa fekundigo. Ili havas stabilan sistemon por elkulturi tuban bovidon. Dank' al tio, oni havigis al si 20 tubajn bovidojn. Tio metis solidan bazon por enkonduki kaj elkulturi bonrasajn bovojn.

Agrikulturo estas la plej grava kampo por apliki la biologiajn teknikojn. Aplikante biologian teknikon, oni povas elkulturi bonrasajn, altproduktajn, antiinsektajn kaj antidegenerajn agrikulturajn plantojn kaj novajn speciojn de brutoj, kortobirdoj, arboj kaj fiŝoj, utiligi regenerajn energiojn, plimultigi la devenojn de manĝaĵoj, brutonutraĵoj kaj medikamentoj, fari benignan cirkuladon sen malutilaĵoj, utiligi diversajn naturajn riĉfontojn kaj ŝpariteron, monon kaj tempon por levi la agrikulturan produktivecon. La esplorado pri biologia tekniko de la ĉina agrikulturo komenciĝis en la 70-aj jaroj. Ĝi forte akcelis la disvolviĝon de la tutlanda agrikulturo.


Kombinante la elkulturon de antero kaj kromosoman inĝenierion kun rutinaj teknikoj, ĉinaj sciencistoj elkulturis 15 speciojn, 37 rasojn kaj 48 ĝermoplasmojn

de rizo, tritiko, kolzo, sukerkano kaj kaŭĉukarbo, kiuj nun kreskas sur miliono da hektaroj da kampoj. La Pekina Laboratorio de Citologia Inĝenierio elkulturis novajn speciojn de tritiko "Jinghua n-ro 1" kaj "Jinghua n-ro 3", kiuj nun kreskas sur 530 000 kaj 66 000 hektaroj da kampoj respektive. Tritiko "Xiaoyan n-ro 107" kaj rizo "Zhonghua n-ro 10" elkulturitaj de la Ĉina Akademio de Sciencoj ambaŭ estas bonkvalitaj, kiuj rezistas kontraŭ malsanoj kaj bone kreskas sur salalkalaj kampoj. Ili kreskis sur 230 000 hektaroj da kampoj kaj dank' al ili oni pliproduktis 85 milionojn da kilogramoj da greno.

En la esplorado pri protoplasma elkulturo kaj hibridigo de somatikaj ĉeloj, ĉinaj sciencistoj elkulturis 40 protoplasmojn de regenerivaj grenplantoj, ekonomiaj plantoj, legomoj kaj drogherboj, el kiuj tiuj de maizo, sojfabo, sorĝo, tritiko kaj aliaj dekelkaj estas la unuaj en la mondo.

En la esplorado pri transformita geno, Ĉinio elkulturis tabakon kapablan rezisti kontraŭ malsanoj, fiinsektoj kaj salo. Dank' al la kunlaboro inter la Mikrobiologia Instituto sub la Ĉina Akademio de Sciencoj kaj la Ĉina Forstokultura Akademio, oni sukcese enigis kontraŭinsektan genon en eŭropan tremolon kaj akiris kontraŭinsektan planton kun transformita geno, kiu povas mortigi ĉiujn limantriojn (*Lymantria dispar*) kaj falenlarvojn, kiuj detruas tremolojn.

S-ro Li Chengsen, profesoro-esploristo de la Botanika Instituto sub la Ĉina Akademio de Sciencoj, kaj liaj kolegoj trovis en Shandong-provinco angiosperman folion kun verda organismo sur vejnoj kaj ĉe la rando, kiu vivis antaŭ 15 milionoj da jaroj, kaj el ĝi s-ro Li sukcese ekstraktis ĝeneralan ĉelan DNA. Fakuloj opinias, ke tio estas nova progreso en la esplorado pri la evoluo de angiospermoj. ■



En la Gonggara Flughaveno

LUOBU CIREN:

Gravaj konstruoj

EN la komenco de la 80-aj jaroj la ĉina registaro investis al la Tibeta Aŭtonoma Regiono pli ol 2 miliardojn da juanoj por 43 gravaj konstruoj kun la kulturaj kaj sanitaraj servoj kiel la ĉefaj. En la lastaj jaroj la Centra Registaro de la Ĉina Popola Respubliko investis al la regiono ĉ. 6 miliardojn da juanoj por aro da gravaj konstruoj, el kiuj iuj baldaŭ plenumiĝos kaj aliaj jam donis profiton.

TRAFIKO KAJ TELEKOMUNIKO — ŜLOSILO POR LA PORDMALFERMO

En Tibeto oni okupiĝas ĉefe pri agrikulturo kaj brutobredado, pli ol 90% de la produktaj rimedoj kaj 80% de la vivrimedoj estas transportataj el aliaj lokoj de Ĉinio. Hodiaŭ en Ĉinio nur Tibeto ne havas fervojojn. Oni transportas varojn ĉefe per ŝoseoj. La postgintaj trafiko kaj telekomunikado malhelpas disvolviĝon de la tibeta ekonomio.


Por solvi la problemon, en 1988 la ĉina registaro investis pli ol 200 milionojn da juanoj por rekonstrui Nagqu-Qabdo-an Ŝoseon kunligantan la nordan Tibeton kun la orienta kaj la Ĉina-Nepalan Ŝoseon, ligantan Lhasa kaj Zhangmu, landliman havenon. Nun, la Nagqu-Qabdo-a Ŝoseo estas triaklasa grua ŝoseo kaj la vojo inter Lhasa kaj Xigaze de la Ĉina-Nepala Ŝoseo estis asfaltita kaj trapasis ekzamenon. Samtempe kun tio, asfaltado de la tera vojo de la ŝoseo inter Lhasa kaj Xigaze, grava urbeto en suda Tibeto, jam komenciĝis.

De 1992 la Centra Registaro de Ĉinio sinsekve investis 80 kaj 100 milionojn da juanoj por reformi la Qinghai-Tibetan Ŝoseon kaj Sichuan-Tibetan Ŝoseon, arteriojn de Tibeto. La nova eksperimenta pavimado por reformi la tundran vojdon de la Qinghai-Tibeta Ŝoseo jam finiĝis. Qumar-pontego kaj tuneloj en Erlang-monto nun estas en konstruado.

En la lastaj jaroj la ŝtato donis

ankaŭ grandan helpon al la avia da afero de Tibeto. En 1989 la Centra Registaro asignis 268 milionojn da juanoj por ekspansiigi la Gonggaran Flughavenon de Lhasa. Tie jam konstruiĝis 4 000-metra kurejo, la plej longa por civila aviadilo en la lando. Tie instaliĝis telekomunika kaj pilota ekipaĵoj kaj modernaj aparatoj avangardaj. Ĉiuj tiuj instalaĵoj kaj ekipaĵoj jam ekfunkciis. Tie povas ekflugi kaj surteriĝi ĉia ajn pasaĝera kaj ŝarga aviadiloj. Ĝi estas la plej altsitua flughaveno en Ĉinio. La Aerodromo Bangda kun totala investaĵo de 210 milionoj da juanoj plenumiĝos en 1994 laŭ la plano, kiu multe mildigos la trafikan streĉitecon de orienta Tibeto kaj la Sichuan-Tibeta Ŝoseo.

En la lastaj jaroj rapide progresis poŝto kaj telekomunikado en Tibeto. En Lhasa la telefona centralo kun 5 000 programregaj telefonaj lineoj finkonstruiĝis kaj ekfunkciis en 1992, kaj tiel la totala telefona kapacito de Lhasa duobliĝis. Nun tie funkcias 10 000 telefonaparatoj. Al la 58 satelitaj



En satelita telekomunika ter-stacio



Termoelektrejo en Tibeto

en Tibeto

telekomunikaj terstacioj de la regiono nun estas muntataj la unuaj ekipaĵoj. Disvolvo de poŝto kaj telekomunikado estas unu el la ŝlosilaj problemoj por malfermi Tibeton. En 1991-1995 la monsumo asignita de la Centra Registaro por reformi la poŝtan kaj telekomunan teknikojn de Tibeto atingos 336.2 milionojn da juanoj. Nun Lhasa, Shannan kaj Qabdo jam aliĝis al la aŭtomata longdistanca telefona reto internacia kaj enlanda. En 1995 ĉiuj gubernioj de la regiono havos telefonon, 7 urboj kaj parto de la gubernioj aliĝos al la landa aŭtomata longdistanca telefona reto.

ENERGIO — PREMISO DE DISVOLVO DE LA LOKAJ INDUSTRIOJ

Tibeto, la "monda tegmento", estas abunda je akvofontoj, kiuj okupas la unuan lokon en la lando, kaj povas produkti elektron de 56.6 milionoj da kilovattoj, kiuj okupas la trian lokon en la lando. En Tibeto pli ol 600 gubernioj havas tervarman fonton kun latent

produktopovo de elektro de 800 000 kilovattoj. Tamen la tervarmaj riĉfontoj ankoraŭ ne transformiĝis en energion, manko de energio ĉiam malhelpas disvolviĝon de la tibeta ekonomio.

Por ŝanĝi la fizionomion, nun la regiona registaro rigardas energian konstruadon kiel graviton por disvolvi sian nacian ekonomion. Tiucele ankaŭ la Centra Registaro investis grandan monsumon al Tibeto.

La konstruata hidroelektrejo Yarzhoyum en la loko inter Lhasa, Xigaze kaj Shannan estas la plej granda entrepreno de Tibeto en ĝia ekspluatado de akvofontoj. Post trijara detala teknika esplorado far koncernaj departementoj, la konstruado kun totala investo de ĉ. 800 milionoj da juanoj komenciĝis en 1989. La hidroelektrejo kondukos akvon de la lago Yarzhoyum, tra la monto Gambala, al la suda baseno de la rivero Yarlung Zangbo, utiligante la niveldiferencon de 840 m. Post finkonstruiĝo de la hidroelektrejo,

ĝia totala generatorara kapacito atingos 90 000 kilovattojn. Ĝia elektro ne nur kontentigos la bezonon de la industria kaj agrikultura produktado kaj loĝantara vivo de Lhasa, sed ankaŭ kunligos Lhasa, Shannan kaj Xigaze en grandan elektroreton por doni elektron al la ekonomia ekspluatata distrikto en la mezaj basenoj de la riveroj Yarlung Zangbo, Nianchu kaj Lhasa. Krom tio, la ŝtato asignis 200 milionojn da juanoj al la elektrejo Chalong en la kanjono de la neĝkovrita monto 4 400 m alta super la marnivelo norde de Tibeto. Oni komencis ĝian konstruadon en marto 1993.

En la lastaj jaroj la ŝtato ankaŭ donis investaĵojn por ekspluati termfontojn. La Termoelektrejo Yangbajan estas la plej granda tiuspeca elektrejo en Ĉinio. Post kiam la du generatoraroj de ĝia duperioda konstruo de Erzhan-elektrejo ekfunkciis en 1988, en majo 1989 la ŝtato asignis plie 57.62 milionojn da juanoj por ĝia

(Daŭrigo sur p. 12)

Refoje en Pekino



Geedzoj Dietrich Meusel (meze) en Pekino

CINA proverbo diras: “Unu vido valoras pli ol cent aŭdoj.” Tiun ĉi sencon kaj la verecon mi travivis pere de mia dufoja vizito de Ĉinio, specife de la ĉefurbo Pekino. La unuan fojon mi ĉeestis antaŭ du jaroj (mi raportis en EPĈ 11/91), kaj miaj impresoj estis tiel imponaj, ke nun jam la duan fojon mi revenis kun mia edzino kaj travivis du ege interesajn semajnojn.

Laŭdindaj estis kaj denove estas la grandanima gastamo kaj helpo de la esperantistoj. Anstataŭ ĉiujn, kiuj akompanis min, mi mencias la amikojn Li Shijun kaj Wang Yanjing. Ili demandis min pri miaj deziroj, listigis ilin kaj aranĝis ampleksan programon por ni. Akompanate de ili ĉiutage multe ni travivis. Kvankam jam unufoje mi estis en Pekino, ĉi-foje mi travivis ege interesajn tagojn kun multaj novaĵoj. Pekino havas tiel multe da vidindaĵoj, ke oni devas kelkfoje viziti por ĉekkoni ĉiujn ĝiajn interesajn tagojn.

Estas interesaj ne nur la vidindaĵoj, sed ankaŭ la ĉiutaga pulsanata vivo por mi, eŭropano, ne imagebla aŭ kredebla. Ekzemple la trafiko. En Pekino kun ĉirkaŭ

10 milionoj da loĝantoj ekzistas pli ol 7 milionoj da bicikloj (ĉirkaŭ 5 milionoj el ili ĉiutage survoje). Kiamaniere mi kiel turisto trapasis straton piede? Unue mi nur vidis amason de bicikloj kaj aŭtomobiloj kaj aŭtobusoj. Sed tamen sukcesas al la piedirantoj trapasi stratojn kiel ankaŭ al mi. Sed la sistemo por mi ĝisfine restas neklara. En Pekino mi vidis neniun akcidenton. Nur unufoje estis negrava kolizio inter du biciklantoj kaj ankaŭ nur unufoje mi aŭdis sirenon de polico aŭ fajrobrigado. Unu tagon mi mem veturis per biciklo, sed ne trapasis stratkrucon, tiel granda cirka artisto mi ne estas. Mi diras, ke sur stratkrucoj regas la organizita ĥaoso.

Antaŭ du jaroj ankoraŭ ne estis tiel densa trafiko. Multe da taksioj intertempe estas, multe da novaj hoteloj, loĝejoj kaj aliaj konstruaĵoj ekestis, sed bedaŭrinde ankoraŭ ne estas solvita la granda loĝejmanka problemo. Ankaŭ novaj larĝaj ŝoseoj estas konstruitaj, sed tre ofte estas haltanta trafiko kaj tro plenaj aŭtobusoj. Por mi estis granda kontraŭeco: unuflanke tiel ĉarma kaj ĝentila popolo, sed aliflanke malfavora enaŭtobusigante, preskaŭ

estas batalo.

Ofte mi estas demandita, kio estas la plej bela, ĉarma en Ĉinio. Eble mi havas eksterordinaran respondon. Tio, laŭ mi, estas la infanoj. Ili ĉiam bonaspektas, estas bonege vestitaj, amplekse prizorgitaj de la gepatroj kaj pli ofte de la geavoj, ili preskaŭ ĉiam ridetas kaj ludas kune sen kverelo.

Amikoj ankaŭ demandas min, ĉu estis io, kio ne plaĉas aŭ ĝenas min. Tiam mi devas iomete pripensi, serĉi en miaj memoroj. Ho, jes, malagrable por mi estis la vizito de la Pekina Stacidomo. Ne pro la amaso de homoj, sed mi scias, ke oni tre longe devas atendi — ofte kelkajn tagojn — ĝis ricevo de biletoj. Pro tio multe da homoj sidas aŭ kuŝas surtere kaj manĝas, ludas kartojn aŭ dormas. Ĉu vere ne estas eble plibonigi tiun situacion?

Se oni demandas min, kio estas la plej impona evento, tiam mi havas grandan elekton. Certe la Imperiestra Palaco, Tian'anmen-placo (la Placo de la Ĉiela Paco), la Somera Palaco kaj la Granda Muro vere estas imponaj pitoreskaj vidindaĵoj kaj grandaj eventoj por ĉiu vizitanto. Sed ekzemple la du vizitoj de la Tutlanda Ĉampioneca Konkurso

en modernaj sportejoj por mi ankaŭ estis imponaj eventoj, same kiel la ĉiumatena Tajĝiĉjŭan, la tiel nomatan “ombrobokسادon” en parkoj mi admiris. Se oni ellitiĝas frumatene je la 6-a kaj iras en apudan parkon, oni povas vidi, kiamaniere la ne nur maljunaj homoj moviĝas en ege malrapida ritmo, ofte en grupoj ĝis kelkdek personoj, sen aŭ kun iloj kiel ekzemple bastonoj aŭ stangoj. Ankaŭ dancadon sen muziko mi vidis — nekredeble, sed vere. La antaŭlastan tagon, promenante tra la parko Yuanmingyuan mi travivis neatenditan eventon. Wang Lihua demandis min: “Ĉu vi interesiĝas pri figuroj el glacio?” Mi jesis, sed ne kredis, ke estas videbla en septembro. Kvin

minutojn pli poste mi admiris la pitoreskajn glacifigurojn kaj vindindaĵojn en grandega glaciaĵohalo. Interalie mi vidis la Ĉielan Altaron. Ankaŭ tio por mi neniam estos forgesbla.

Dank’ al miaj esperantistamikoj, interalie mi havis la eblecon viziti la konstruaĵon de Radio Pekino. Volonte la kunlaborantoj de la sekcio de Esperanto bonvenigis min, same kiel la japanan esperantiston profesoron Ueda el Tokio, kaj montris al ni la radiostudiojn (ĉambrojn por prepari kaj elsendi la kontribuojn). Mi sidis en la sono-studio kaj parolis kelkajn frazojn sur sonbendon. Tiu vizito estas granda momento kiel esperantisto en Pekino, same kiel la vizito de la

redakcio de EPĈ. Tie mi eksciis, kiamaniere ekestas nia ĉiumatena revuo. Ankaŭ mi povis viziti la laborlokon de mia longjara korespondantino Wang Lihua.

La antaŭlastan tagon de mia restado en Ĉinio mi estis invitita al la kunveno de la Pekinaj Esperantistoj. La ĉeestintaj esperantistoj tre interesiĝis pri la situacio en la unuiginta Germanio kaj la tiea Esperanto-movado. Laŭeble mi respondis al iliaj demandoj.

En mia 26-jara Esperanto-vivo denove mi rimarkis tre klare, ke la esperantistoj estas granda familio. Per tiu ĉi artikolo mi volas danki plenkore al miaj amikoj en Pekino pro ilia grandioza gastamo, helpoj, akompanado kaj plenumo de miaj deziroj. ■

Monkolekto por Fondaĵo EPĈ-abono

Pro altiĝo de la kostoj de eldonado kaj sendado de “El Popola Ĉinio” ni reguligas de la pasinta jaro la abonkotizon kiel jene: la jara abono (inkluzive de sendokostoj) por la evoluantaj landoj kaj evoluantaj landoj respektive estas 26,00 kaj 14,40 usonaj dolaroj aŭ egalvaloraj valutoj ŝanĝeblaj en usonajn dolarojn. Pro tio la plejmulto de niaj legantoj en la orienteŭropaj landoj, la Komunumo de Sendependaj Ŝtatoj kaj la evoluantaj landoj, kiuj havas grandan malfacilon en ekonomio, ne povas plu aboni nian revuon. La reduktiĝo de abonantoj pli altigis la produktokoston de nia revuo kaj devigis nin malpliigi ekde ĉi tiu numero la kolorajn bildojn. Ĉi tie ni petas de niaj legantoj kompremon kaj pardonon.

Konsiderante ilian fortan

deziron daŭre legi nian revuon, ni decidis establi FONDAĴON EPĈ-ABONO, per kiu ni pagos la abonkotizon por iuj malnovaj legantoj kaj esperantistaj aktivuloj de la supre menciitaj landoj. Ni elprenos parton de la rentumo de Ghiselin-Fondaĵo de “El Popola Ĉinio” kiel bazan monsumon de FONDAĴO EPĈ-ABONO. (Tio tute konformas al la deziro de la belga samideano Charles Ghiselin, kiu testamentis, ke lia heredaĵo al EPĈ estu uzata por disvolvo de Esperanto.) Samtempe ni kore petas, ke esperantistoj de la landoj kun bonaj ekonomiaj kondiĉoj monoferu al FONDAĴO EPĈ-ABONO por helpi la nepagipovajn samideanojn. Bonvenas eĉ malgranda sumo. Ni ĉiujare aperigos en nia revuo la nomon kaj ofersumon de ĉiuj donacintoj. Helpemuloj bonvolu sen-

di monon (usonajn dolarojn aŭ valutojn ŝanĝeblajn en usonajn dolarojn) al la konto A/C No. 71411749 je la nomo From People China (El Popola Ĉinio) ĉe Bank of China (Banko de Ĉinio). La adreso de la Banko de Ĉinio estas: Fuchengmennei Dajie, CN-100818 Beijing, Ĉinio. Sendante monon, bonvolu sciigi al ni pri la celo de la oferita mono kun kopio de la banka ĉeko. Oni povas sendi ankaŭ monbiletojn (usonajn dolarojn aŭ valutojn ŝanĝeblajn en usonajn dolarojn) rekte al ni en registrita koverto. La adreso estas: El Popola Ĉinio, P.O. kesto 77, CN-100037, Beijing, Ĉinio.

Antaŭdankon pro via konsidero kaj monofero al FONDAĴO EPĈ-ABONO!

La Red.

Esperantista hobbio

de KRISTIÁN JOZEFO (Slovakio)



Feliĉigas min, ke la gesamideanoj volonte korespondadas senkonsidere de tio, kian religion, sekson, naciecon kaj politikan konvinkon havas lia amiko, respektive kia estas lia patrina lingvo. Vere, ni esperantistoj apartenas al unu granda familio kaj, ni ĉie sur la tuta mondo ĉiam komprenos kaj helpas unu alian, plenumante ĉi maniere la deziron de nia granda instruisto Ludoviko Lazaro Zamenhof.

Mi estas longtempa abonanto de la revuo El Popola Ĉinio, kiu helpis kaj helpas perfektigi mian lingvoscion. Mi komencis lerni Esperanton en 1983, kiam mi ĉesis aktive labori. Kiel pensiulo, havante sufiĉe da libera tempo, mi decidis alproprigi la lingvon, kiu dum cent jaroj disvastiĝis tra la tuta mondo.

Hungara homo mi estas, loĝanto de la urbo Dunajská Streda, situanta sude de Slovakio. Mi parolas hungare, slovake, ĉeĥe, germane kaj Esperante, sed ne pose-

das aliajn mondlingvojn, kiel anglan, francan, portugalan kaj hispanan. Por mi sufiĉas la internacia lingvo E-o, helpe de kiu mi akiris multe da amikoj-esperantistoj, kiuj vivas sur ĉiuj kvin kontinentoj de la mondo.

Pri kio ni korespondadas? Mia opinio pri ĉio, kiel la ĵurnalisto diras: "La temo kuŝas sur la strato, devas ĝin nur levi." Gesamideanoj interesiĝas pri ĉio, kio kunligas nin, skribas pri kutimoj, moroj, naturbeleco de sia lando, tekniko kaj scienco, belaj konstruaĵoj, sukcesoj kaj problemoj, specialaĵoj de kuirarto, belarto, faŭno kaj flaŭro kaj aliaj interesajoj.

Kiam mi estis lernanto 11-12-jara, mi kolektis poŝtmarkojn kaj interŝanĝadis ilin kun aliaj kolektantoj. Kompreneble, kiel infano mi ĉiam admiris tiujn amikojn, kiuj havis ankaŭ fremdlandajn poŝtmarkojn el transmaraj landoj. Mi ĉiam sopiris havi ilin, sed bedaŭrinde ĉiam mankis al mi

la mono. Poste, kiam mi fariĝis junulo, mi jam ne dediĉis necesan tempon al kolekto de poŝtmarkoj, ĉar interesis min aliaj problemoj pli agrablaj.

Post sesdek jaroj mi denove kolektas poŝtmarkojn, ĉar mi ricevas ilin de miaj leteramikoj el la tuta mondo. Agrable surprizis min tiuj poŝtmarkoj el Afriko. Tre belaj kaj valoraj estas la poŝtmarkoj de Ĉinio, kiujn sendis miaj leteramikoj Cao Xioinglin kaj Wei Shan. Ĉiuj, kiuj vidis ilin, kun granda estimo rimarkis, ke la ĉinaj poŝtmarkoj havas egan debiton inter filatelistoj.

Interesaj estas ankaŭ la brazilaj poŝtmarkoj, kiujn sendis s-ino Alice M.Klein, s-roj Severino Ferras kaj Pe. Frei Tadeu Luiz Fernandes. La plej etaj poŝtmarkoj, kiujn mi posedas, estas tiuj, kiuj havas dimensiojn 20 × 20 mm kaj 10 × 10 dentojn. Similan etan pm. emisiis brazila poŝto ankaŭ en 1992.

(Daŭrigo de p. 9)

triaperioda konstruo. Ĝia totala generatorara kapacito atingos 25 000 kilovattojn. Plenumiĝo de la elektrejo estos senprecedenca en utiligo de la tervarma riĉfonto de malalttemperatura malprofundaĵo al industria ekspluatado. Nun estas utiligataj ankaŭ la tervarmaj kampoj Nagqu kaj tervarma kampo Langqiu en la regiono Ali. Oni faras prospektadon al la profundo de la tervarma riĉfonto de Yangbajan. La tervar-

ma riĉfonto de Yangyixiang estos baldaŭ ekspluatota.

GRANDA SINTEZA EK-SPLUATA PROJEKTO

Ĉe la mezaj basenoj de la riveroj Yarlung Zangbo, Nianchu kaj Lhasa en la centro de la Tibeta Aŭtonoma Regiono estas grava grenproduktejo, kie dislokiĝas urboj kiel Xigaze, Lhasa, Zedang kaj Gyaze. La baseno areo 65 700 kvadratajn kilometrojn. Tie vivas pli ol 784 000 loĝantoj, triono de la totala loĝantaro de Tibeto. La

loko estas politika, ekonomia kaj kultura centro de Tibeto, abundas je mineraloj, akvoenergia kaj laborfortoj, pro tio tie la ekspluatataj kondiĉoj estas favoraj. La ŝtato prenis la sintezan ekspluatadon de la loko kiel breĉon por la konstruado de Tibeto.

En 1991 la konstruado por tiu grandioza projekto oficiale komenciĝis, ĝis nun 52 konstruoj estas farataj. Oni senĉese akiris sukcesojn en konstruado de kanalo, interkruciĝintaj konstruaĵoj kaj pado, en instalo de elektra kabloj,

Eminente belajn kaj interesajn poŝtmarkojn emisiis Sovetunio, pri kiuj oni povus babili longe, eĉ skribi broŝuron.

Oni kutimas diri, ke la poŝtmarkoj vivas, parolas kaj disdonas belecon de sia lando, montrante la kulturan vivon de la popolo. Mia opinio la poŝtmarko estas "parteto" de la kompetenta lando, kiu tiel demonstras sian ekziston kaj vekas atenton ĉirkaŭ si, por ke la homoj estimu kaj rekonu ĝin. Kiam mi prenas la poŝtmarkon, mi ĉiam pensas pri tio, ke ĝi estas vere "peco da nekonata lando", kiu meritas honoron.

Krom la poŝtmarkoj mi kolektas ankaŭ fotojn kun aŭtografo de elstaraj, fame konataj personoj, ŝtatestroj, politikistoj, reĝoj, reĝinoj, sciencistoj kaj aliaj eminentuloj. Ĝis nun mian modestan peton plenumis ĉiuj, krom s-ro M.Gorbaĉov, eksprezidento de Sovetunio.

Mi havas apartan fotoalbumon, kie mi gardas jenajn fotojn kun propranaj subskriboj de eminentuloj:

Ŝia reĝina moŝto Elizabeta la Dua, Britio, s-ino Margaret Thatcher, ĉefministrino de Britio, s-ino Kim Campbell, iama ĉefministro de Kanado, karmemora Gustáv Husák, eksprezidento de ĈSFR, s-ro Václav Havel, prezidento de iama ĈSFR kaj nuna Ĉeĥa Respubliko, s-ino Corason

Aquino, eksprezidentino de Filipinoj, karmemora Rádživ Gándhí, ĉefministro de Hindio, lia reĝa moŝto Juan Carlos kaj lia edzino Sofia, Hispanio, s-ro Michal Kováč, prezidento de Slovacia Respubliko, s-ro Ronald Reagan, eksprezidento de USA, s-ro Péres de Cuellar, iama ĉefsekretario de Unuiĝintaj Nacioj, s-ro Butrus Butrus-Ghálí, nuntempa ĉefsekretario de UN., s-ro Juan Antonio Samaranch, prezidanto de la Internacia Olimpia Komitato, kaj gvidantoj kaj sciencistoj de Aŭstrio, Belgio, Finnlando, Germanio, Hungario, Izraelo, Pollando kaj Sud-Afriko.

Nombro de ĉi kolekto verŝajne pligrandiĝos, ĉar ĝis nun mi ne skribis al aliaj fame konataj, elstaraj eminentuloj, kiuj tion meritas kaj eble ili volonte plenumos mian peton.

Estus interese ekspozicii la ricevitajn poŝtkartojn, kiuj nombras pli ol ducent pecojn. Se mi volus viziti la vidindaĵojn, mi devus esti milionulo kaj pli juna, ol hodiaŭ mi estas.

La ricevitaj poŝtkartoj estas tre belaj kaj interesaj, kiujn mi povas partigi laŭ diversaj aspektoj, ekz. laŭ naturbelajoj, marbordo, lagoj, riveroj, akvofaloj, gejseroj, valoj, rokmuroj, montpintoj, diversaj konstruaĵoj, katedraloj, preĝejoj, teatroj, muzeoj, statuoj, monumentoj, interese solvitaj vojkruciĝoj en metropoloj ktp.

Menciindaj estas la ricevitaj leteroj, ĝustadire la kovertoj af-rankitaj per belaj poŝtmarkoj, kiuj nombras pli ol kvarcent pecojn.

La poŝtkartoj kaj kovertoj havas sian apartan lokon en mia skribtablo. La kovertoj estas diversformaj kaj diverskvalitaj, senditaj plejparte per aerpoŝto, kies randoj estas koloritaj per blua kaj ruĝa strioj — la brazilaj per flava kaj verda strioj. Ĉiuj kovertoj estas afrankitaj almenaŭ per 2-3 poŝtmarkoj, sed la brazilaj surhavas eĉ 12-13 pecojn. La plej belajn kovertojn kaj fajnan leterpaperon uzas niponanoj montrante sian altan teknikon ankaŭ en paperfarado.

Apartan mencion meritas la memorkovertoj, afrankitaj per konvenaj poŝtmarkoj, kiuj estas provizitaj je unuataĝaj stampoj. Ili estas vere valoraĵoj por la kolektanto, kiuj post la paso de la tempo multobligas sian propran valoron. Iu kolektisto de artobjektoj, kiu vidis la kolektaĵojn, taksis ilin je 180 000 sk (slovaka krono). (1 US dolaro valoras 33 sk, entute 5 454 USD).

Mi estas tre feliĉa, kiam la poŝtisto sonorigas kaj transdonas leterojn, kiujn skribis gesamideanoj el diversaj mondpartoj aŭ malproksimaj landoj. Kun ega ĝojo mi legas la leterojn kaj, se eblas, mi tuj respondas, por ke la karajn amikojn ankaŭ mi povu agrable surprizi. ■

en arbarizado kaj en kulturado de diversaj teknikaj fakuloj. Kun plenumiĝo kaj ekfunkcio de iuj bazaj instalaĵoj, kiaj akvokonservejo, pumpstacio kaj kanalo, irigaciado por la ĉ. 20 000 hektaroj en la ekspluata distrikto estos garantiata, la jara produktokvanto de greno atingos 10 milionojn da kg, tiu de oledonaj semoj — 150 000 kg kaj tiu de legomoj — milionon da kg, fine la distrikto fariĝos bazloko de greno, brutoproduktaĵo, legomoj kaj flankmanĝaĵoj, kaj tiu de malpeza, tekstila kaj metia

industrioj kaj scienc-teknika ekspluato kaj disvastigo.

Por akiri grandan ekonomian kreskon en mallonga tempo de la Tibeta Aŭtonoma Regiono, en la lastaj du jaroj la regiono, helpate de UN, efektivigas la sintezan ekspluatadon "la konstruon 3357" en la rivervalo de Lhasa kaj la meza baseno de la riveroj Yarlung Zangbo, Nianchu kaj Lhasa. La konstruo dank' al mezperioda reformado jam pligrandiĝis la irigacian areon je 2 657 hektaroj kaj pliproduktis 700 tunojn da greno


ĉiujare.

Krome, la Kromofera Minejo Luosha en suda Tibeto, la plej granda bazloko de kromofero en Ĉinio, jam havas sian rudimenton. Nun ĝi ekspluatas ĉiujare 50 000 tunojn da erco kaj oficiale funkcios en 1994. La projekto por sinteze ekspluati Niyanghe en orienta Tibeto jam estis ekspertizita de fakuloj.

Tiuj gravaj konstruoj en Tibeto rapidigos la ekonomian disvolviĝon de la regiono kaj akcelos la ekonomian disvolviĝon de iuj gravaj lokoj. ■

Kristalo de la racia konsiderado

de SHI CHENGTAI



La Nova Realismo de Bruno Vogelmann, la ĉina traduko de Zhang Danchen, dulingva eldono, p. 350+10, Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1992, Pekino.

Traleigante la libron de Vogelmann, mi brulas pro sublimaj pens-fajreroj de la aŭtoro. La historia paŝo iom post iom rapidas, la homaro vivanta sur la terglobo kreis kaj kreas brilan civilizacion, kio ankaŭ kun la proceso de industriigo alportas amarajn fruktojn al la homaro. Kiel vivas la homaro racie kaj akiras plie la socian progreson?

Kiel denove koni nian mondon kaj klopodi por feliĉa vivo fariĝas la plej urĝe solvenda tasko de la hodiaŭaj filozofoj, nu, ne nur de filozofoj, sed ankaŭ de ĉiu klera homo. B. Vogelmann pri tio faris seriozan konsideradon kaj verkis la libron *La Nova Realismo*, bazite sur propra riĉe buntfaceta vivo-sperto kaj esplorado en terenoj de politiko, filozofio, ekonomio, kulturo kaj scienc-tekniko. Li opiniis, ke homoj devas starigi novan mondkoncepton por suriri la ĝustan vojon kondukantan al la futuro, bela kaj harmonia. En sia verko la aŭtoro eksplikis sian rezulton dum konsiderado kaj esplorado

je 4 partoj: 1. La Nova Realismo; 2. Je Komenco de La Nova Socia Erao; 3. La Religia Problemo; 4. La Nova Pensado.

Ekleginte la libron, freŝaj tezoj de la aŭtoro tuj kaptis min. La vivo estas la plej alta valoro, kiun ni konas. (p. 187) Tio interesis min, ĉionon, ĉar nia majstro Konfuceo (551-479 a.K.) diris, ke la homoj estas la animo de ĉiuj estaĵoj en la mondo. Tamen la ĉinaj konfuceanoj opiniis, ke homoj estas regantoj sur nia terglobo, tial ĉio sur la terglobo servu por la vivo de homoj. Sed la modernigo de la homa socio ankaŭ alportas mankon de naturaj riĉfontoj, polucion de tutmonda medio, detruadon en militoj por genta aŭ etna intereso ktp... La aŭtoro menciis ke "la homo estas interplektita en tiun proceson de evoluo kaj disvolviĝo de la vivo. En la ĉeno de tiu evoluproceso li estas ĉenero kaj dufoje interligita kun tiu" (p. 195), tial "ni devas komune labori por ke paca kaj prosperiga kunvivo de la homoj sur la tero estu ebla," kaj "ni, homoj, estas responsaj por ĉiu vivo en la naturo, kiu ja estas nia vivobazo, el kiu ni devenas."

Por pli klare koni novan profundan ŝanĝon de la homa socio,

la aŭtoro emfazis, ke homoj devas liberigi sin de influo kaj regado de dogmoj kaj ideologioj, ĉar la mondo senĉese moviĝas kaj historio evoluas. Li temis pri vidpunkto de nova religio, nome kristanismo sen dogmo. La aŭtoro diris al ni, ke "religio estas kreskinta el la travivo kaj sperto de la homoj".

La aŭtoro eksplikis, kio estas la vivo: "Ĉar la dialektikaj principoj efikas ĉie kaj ĉiam en la naturo kaj montriĝas tie, kaj ĉar ĉiam — kvankam kun multaj malsukcesoj — ŝtupo sekvas ŝtupon, ni ne povas fari alion ol nomi VIVO la kompletan monddoproceton." Tio certe donas al mi freŝan inspiron pri vivo, kiu ja estas en Naturo. Poste, la aŭtoro temis pri la Morto, Sufero kaj Fremdigo, laŭ sia serioza pensado.

En la lasta parto de sia verko Vogelmann sufiĉe diskutis pri la Nova Pensado laŭ principoj de la dialektiko, laŭ mi materiisma, ĉar li opiniis ke "la Nova Realismo estas mondkoncepto, kiu sekvas el la Nova Pensado", frukto de racia konsiderado. En la hodiaŭa epoko, en kiu la homoj pli multiĝas kaj sociaj problemoj serioziĝas iom post iom, la homaro deziras marŝi antaŭen,

do ili ofte renkontas pli kaj pli multajn problemojn solvendajn sur sia vojo, tial la homoj devas havi la komunajn pensadon kaj agadon por vivado de la homaro kaj terĝlobo. Li emfazis, ke "la Nova Realismo devas esti bazo kaj direktivo por ĉiuj gvidantoj kaj responsuloj inter homoj. Nur tiam ni ĉesos disipi dum multflanka batalo multvalorajn energiojn kaj naturajn riĉaĵojn. Nur tiukaze realiĝos fruktodona kaj paca evoluo por bonfarto de ĉiuj. Nur tiukaze ni sukcesos atingi pli altan ŝtupon de la vivo." (p. 186) S-ano Vogelmann, kiel entuziasma Esp-movadano, ankaŭ menciis la rolon de Esp-movado en la prosperiĝo de la homa socio. (vd. p. 299)

La verko ja estas elstara kontribuo al la homa kulturo, en kiu nia movado fariĝas organika parto. Kompreneble Vogelmann ne donas preskribon por kuraci nian mondon, tamen li certe donacas al ni spiritan trezoron, kiu efikas dum ni pensadas pri la futura vojo de la homaro por la afero de homa harmonio! Ĉar la libro estas verkita en Esperanto, ĝi fariĝis la plej forta pruvaĵo de la perfektigo kaj seriozeco de Esperanto. La verko havas versiojn de 14 lingvoj, tio elokvente montras la valoron de nia lingvo por la mondo kaj futuro.

La traduko en la ĉina lingvo ankaŭ havas alian efikon, ke ĝi alportas novan mondkoncepton

al ĉinaj intelektuloj, kiuj atente studas la nuntempajn pens-tendencojn el la Okcidento kaj teoriojn de filozofoj ekster Marksismo-Leninismo, tio instigos interfluan de kulturoj. La traduko estas stilkonciza (same kiel la originalo) kaj facile komprenebla por ĉinaj legantoj, tio kredigos la valoron de Esperanto al ĉinoj dum disvastigo de nia movado. Eĉ se pli multaj s-anoj verkos en Esperanto tiajn elstarajn librojn, kiel Vogelmann (precipe en sia profesia fako), do, certe miros antaŭ la talenta kreaĵo de Zamenhof eĉ tiuj, kiuj iam dubis la valoron de Esperanto, kaj volonte iros en nian movadon. ■

KORESPONDI DEZIRAS

Tarifo: Du internaciaj respondkuponoj por kvin vortoj aŭ mallongigoj. Esp-organizo kaj niaj perantoj ĝuas 50% da rabato. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

* Hu Renkui, fabrikestro, deziras korespondi tutmonde pri eblecoj kunlabori kun eksterlando por produkti fridujajn aparatojn. Bonvenas investado kaj progresintaj ekipaĵoj. Adreso: Shenzhen Kaiguan Peijianchang, 315614 Ninghai, Zhejiang, Ĉinio.

* Yang Hongji, 31-j., kolektas bankbiletojn, poŝtmarkojn, dez. kor. kun E-organizo kaj esperantistoj kaj starigi konstantan amikan rilaton por ke diverslandaj amikoj, precipe esp-istoj, vojaĝu kaj investu en Daqing. Tie estas multaj favoraj politikoj por kunlaboro. Adr.: Caiyouyichang, Liukuang, Ceshidui, Daqing 163111, Heilongjiang, Ĉinio.

* Amikoj kaj entreprenistoj de diversaj profesioj de la tuta mondo estas bonvenaj al Guangzhou por trakti marmangaĵan komercadon kun Lin Zhongxin, prezidanto de Guangzhou-a Manĝaĵa Limigita Kompanio Fuge kaj Komerca Lim-

igita Kompanio Fuweida, kaj Zhang Fuge, ĝenerala direktoro. Adreso: S-ro Fang Yunzang, F/2, 631 Longjin Zhong Lu, CN-510140 Guangzhou, Ĉinio. Tel: (020)8811396, 8812342, Fakso: (020)8811396, 8883202.

* Tiuj, kiuj interesiĝas pri poŝtmarkoj emisiotaj de Ĉinio, inkluzive de Taiwan, en 1994, bonvolu kontakti s-ron Fu Guoqing per la adreso: Dianjichang 10-Chejian, Harbin 150040, Heilongjiang, Ĉinio.

* Feng Kuang, 31-j., dez. kor. kun tutmondaj filatelistoj, kolektas kaj interŝanĝas diverslandajn poŝtmarkojn. Adr.: Huianli 1-Zhuang 1-Men 202-Shi, Tangguqu, Tianjin 300450, Ĉinio.

* Nova adreso de J. A. Tarducci: Mazzini 284, I-40062 Molinella-BO, Italio. Tel: 051-881038.

* Helmut Eschen, 44-j. fraŭlo, dez. kor. Esperante aŭ ĉeĥe pri amikeco, kol. telefonkartojn. Adr.: Hel sinkier Str. 83/801, D-18 107 Rosstock, Germanio.

* La jenaj tri infanoj el la sama familio lernas Esperanton kaj volonte korespondos kun samaĝuloj el Ĉinio. Birgit Tunemyr, 13-jara knabino; Wilhelm Tunemyr, 11-jara knabo; kaj Else Tunemyr, 9-jara knabino. La adreso de ĉiuj estas:

Lonnvagen 11, S-561 38 Huskvarna, Svedio.

* Deziras ŝanĝi nur uzitajn pm prefere nord-eŭropajn antaŭ 1982. S-ro Gallo Lassere Paolo, Via San Martino 100, 10060 Cantalupa, Italio.

* John Killian, 49-j, instruisto, dez. kor. kun ĉinaj geinstruistoj pri biologio spe. anatomio kaj fiziologio. Respondos per Esperanto, angla, hispana aŭ germana lingvo. Adr.: 2415 Oregon, Roanoke, VA 24015, Usono.

* Pekim Vaz ŝatas interŝanĝi ideojn, poŝtkartojn kaj librojn. Adr.: Caixa Postal, 182, Belem — PA, 66017-970, Brazilo.

Teknika-Kultura Asocio "Amiko" planas starigi radiostacion de mallongaj ondoj "Radio Amiko", cele diskonigi Esperanton tra la tuta mondo.

Helpo per Esperantaĵoj, libroj, poŝtmarkoj, bildkartoj kaj eĉ financaj rimedoj estos bonvena. Respondo garantiata. Adreso: Teknika-Kultura Asocio "Amiko", Via Favencia 141, 08038 Barcelona, Hispanio.

* 40-jara oficejestro, 1,80 m, eksedzigiinta korespondos geedzigele junulinon. Adreso: Vito Geoffroy, Immeuble Jean Moulin, F-54390 Frouard, Francio.

Amiko pro telefono

MI telefonis al iu fakulo por konsulto. “Vi eraris,” mi aŭdis raŭkan krudan viran voĉon en telefono. Kun miro mi refoje turnis la ciferdiskon.

“Hej, aŭdu, vi eraris en la numero.” Sonis la sama voĉo.


Kial li asertis, ke mi eraris en la numero? Mi triafoje telefonis laŭ la numero.

“Hej, lasu,” diris la voĉo, “ĉu ankoraŭ estas vi?”

“Jes,” mi diris, “mi volus scii, kiel vi povis certigi, ke mi eraris, antaŭ ol mi ekparolis?”

“Aŭdu, nun neniuj telefonas al mi.” Denove rompigis la interparolo.

Kial do li ankoraŭ havas telefonaparaton? Tenante la aŭdilon en la mano por momento, mi refoje telefonis al li.



“Kion vi volas ĉi-foje?” li demandis.

“Nur por saluti vin.”

“Saluti min? Kial?”

“Jes, mi pensas, ke mi devas telefoni al vi, se neniuj tion faras.”

“Do, saluton. Kun kiu mi parolas?”

Mi atingis mian celon. Nun estis lia vico por esti scivolema. Mi diris mian nomon kaj demandis la alian.

“Mi nomiĝas Adolfo Meis, okdek-ok-jara. En la pasintaj 20 jaroj mi neniam estis tiom multe misvokita en unu tago.” Ni ambaŭ ridis.

Nia interparolado daŭris dek minutojn. Adolfo ne havis familianon, nek amikon. Ĉiuj liaj proksimuloj jam forpasis. Li laboris 40 jarojn en mia profesio. Ŝajne li estis interesa kaj afabla.

En la sekvanta posttagmezo kaj post kelke da tagoj mi telefonis al Adolfo. Tion mi faris ne sole pro mia simpatio al la soleca grandaĝulo, sed ankaŭ pro mia bezono. Interparolo kun Adolfo fariĝis tre grava por mia kripla vivo — mi ne havis patron.

Adolfo fariĝis mia fervora konsilanto. Foje mi diskutis kun li pri la disputo inter mi kaj mia superulo. Mi diris al mia nova amiko, ke mi volas argumenti kun mia superulo.

“Kial tiel malpacienca?” diris Adolfo. “Malvarmigu la aferon. Kiam vi estos en mia aĝo, vi komprenos, ke tempo povas solvi multajn problemojn. Vi interparolu kun li, se la stato fariĝos pli malbona.”

Iun vesperon Adolfo menciis en telefono, ke baldaŭ estos datreveno de lia naskiĝtago. Mi aĉetis kruĉplakaĵon kaj faris el ĝi salutkarton, metis sur ĝin torton kaj 89 kandelojn. Miaj kamaradoj kaj eĉ mia superulo subskribis por gratuli lin. Mi pensis, ke Adolfo ĝojiĝos de surpriza gratulo.

Matene de lia naskiĝtago mi veturis al lia loĝejo. Enirinte en la domon, mi vidis leterportiston distribuanta poŝtaĵojn en la vestiblo. Mi trovis la nomon Adolfo sur leterkesto.

Rapide batis mia koro. Ni interparolis en telefono jam kvar monatojn kaj fine povis vidi unu la alian. Mi frapis sur la pordo de Adolfo. Ne venis respondo. Mi frapis pli forte.

Kaj la leterportisto levis la kapon kaj diris: “La ĉambro estas vaka.”

“Ĉu s-ro Meis ne loĝas ĉi tie?” mi demandis.

“Malfeliĉe, li forpasis antaŭ hieraŭ,” li diris trankvile.

Adolfo forpasis? Mi mutiĝis por longa tempo. Mi staris kun surpriziĝo kaj malĝojo. Mi retenis min, diris al li dankon kaj eliris en la antaŭtagmezan sunon.

Mi metis la nemalfermitan salutkarton sur la postan benkon. Antaŭ ekveturo mi returnis min kun murmuro: “Adolfo, mi ne erare telefonis, ke mi konis vin.”

ESP-NOVAĴOJ

● En 1993 la Zaozhuang-a E-Asocio de Shandong-provinco kaj la Verd-stela Kompanio por Scienc-teknika Eksploato de la urbo kune fondis la tutlandan verd-stelan informoreton kaj decidis eldoni la gazeton “Verd-stelaj Informoj”, kiu servas ĉefe al e-istoj. La gazeto estas destinita por doni informojn pri la ĉina ekonomio, transdono de patentitaj teknikoj kaj internacia kunlaboro.



Gesinjoroj Fontaine antaŭ sia vendejo “Esperanto”

● “Akcesoraĵoj, kiuj parolas internacian lingvon” estas la slogano de vendejo nomata “Esperanto” en Minneapolis, Minnesota, Usono. La geproprietuloj Louise kaj Robert Fontaine elektas objektojn kun distinga stilo kaj arta valoro el pluraj landoj,

inkluzive de Ĉinio, Italio, Turkio, Hindio, Hungario, Francio, Usono k.a. Aĉeteblaj varoj inkludas juvelaĵojn, vestojn, manĝilarojn, ludilojn en formo de remburitaj bestoj, metiartaĵojn kaj meblojn. Gesinjoroj Fontaine ĝis nun ne flue parolas Esperanton, tamen ili subtenas ĝian disvastigadon. Ĉe la vendejo ili disdonas faldfoliojn pri E-o al butikumantoj, kiuj scivolas la lingvon, kaj ili kutime tenas la libron “Teach Yourself Esperanto” (Instruu al vi mem Esperanton) por montri pli detale. La adreso: Esperanto, 910 Nicollet Mall Minneapolis, Minnesota 55402, Usono.

● Estrino de la privata muzeo de poŝtkartoj volonte aranĝus ekspozicion de Esperantaj poŝtkartoj, poŝtmarkoj aŭ stampoj dum la dua Mondkongreso de E-Handikapuloj en Kladno de Ĉeĥa Respubliko. Por helpi al ŝi kaj precipe por famigi Esperanton inter multaj vizitantoj de tiu muzeo, ŝi petas ĉiujn legantojn de EPĈ sendi al ŝi karton rilatan iamaniere al Esperanto, novan aŭ malnovan, uzitan aŭ neuzitan. Adr.: František Molík, Zákoutí 269, 547 01 Náchod Nový Svět, Ĉeĥa Respubliko.

● Multaj anoj de la Malnova kaj Mistika Ordeno de la Rozkruco interesiĝas pri Esperantomovado kaj nun jam eldonis en Esperanto la libron: “La Regado de la Vivo” kiel unu el siaj agmanieroj, kontaktiĝu kun ili laŭ la adreso: Grand Lodge of Japan

AMORC, 49-16, Wakamiya 2-Chome, Nakano-Ku, Tokyo 165-Japan.

● Nova lernoĵaro de Pola Esperanto-Asocio komenciĝis la 16-an de septembro 1993 en Krakovo, ankaŭ Krakova filio de PEA post malfacilaĵoj komencis agi en nova sidejo en Kultura Domo “Podgorze”. La inaŭguron gvidis prezidento Stanislaw Swistak, ĝin partoprenis ankaŭ gastoj el Staszow.

● 46-jara pola instruistino Kupczak Aleksandra ekde la jaro 1966 laboras en lernejo, en kiu la infanoj lernas ankaŭ Esperanton, ĉar ili ĉiuj amas nian komunan lingvon — Esperanto. La foto prezentas la instruistinon kun ŝiaj gestudentoj, kiuj tenas en la manoj “pajlan pupon”, kiu simbolas malbonan vintron. La lastan tagon de vintra sezono, oni dronigas la pupon en akvon kaj de tiam atendas alvenon de printempo.

● Konata kimra pentristo Roberto Parker-Munn presigis laŭ sia oleaĵo poŝtkarton “Kvin katoj” en la lingvoj kimra, angla kaj Esperanto. Li apartenas al la internacia grupo “Rondo Kato”, kaj nun ofertas siajn artan kaj reklaman servojn pro firmaoj. Faru viajn mendojn al: Roberto Parker-Munn, Nantyrhebog Farmhouse, Glynbrochan Llanidloes, Powys, Wales, Anglio, S478 6pj.

Partoprenantoj en la inaŭguro



Instruistino Kupczak Aleksandra kaj ŝiaj lernantoj



En neĝkovrita forstejo


Fotoj de LU ZHONGMIN

En marto tra suda Ĉinio pulsas printempo. Tie verdas arboj kaj disvolviĝas floroj. Sed tiam regas granda frosto en la vilaĝoj kaj forstejoj de Heilongjiang(-Hejlongĝjang)-provinco en la plej norda parto de Ĉinio. Tie la tero estas kovrita de glacio kaj neĝo. Ĉinio estas vastega kaj situas en la subtropika, varmeta kaj malvarmeta zonoj. En frua printempo la temperatura diferenco estas inter 30°-40°C. La pejzaĝoj en la sudo kaj nordo de Ĉinio draste kontrastas. Jen fotoj pri forstej en la provinco.



Sur vilaĝa strato

Fumo el kamentuboj






Vilaĝo en neĝo

Sur vojeto en arbaro



Tegmentoj kovritaj de neĝo



Prosperas Suzhou, Wuxi kaj Changzhou

Teksto de **JI PING**

Fotoj de **MO BINGCHUN**

FORLASINTE Nantong, mi veturis kontraŭ la fluo de Yangzi-rivero kaj alvenis al la baseno de Taihu-lago sude de la rivero. Tie mi vizitis la urbojn Suzhou (Suĝoŭ), Wuxi (Uŝji) kaj Changzhou (Ĉangĝoŭ). Sur la vasta tero dislokiĝas lagoj, interkruĉiĝas riveroj, sternaĝas rizkampoj kaj punktiĝas morusarbaroj. Krome, tie estas ankaŭ multaj fiŝbredejoj.

En la 90-aj jaroj la ekspluatado de la baseno de Yangzi-rivero estis enlistigita kiel grava laboro de malfermita regiono de Ĉinio. Kaj en la urboj leviĝis modernaj konstruaĵoj unuj post aliaj.

LA ANTIKVA SUZHOU

Kiel administra centro, la 2 500-jara Suzhou havas ses urbojn kaj guberniojn. Dank' al la reformado kaj pordomalfermo, Suzhou faris rimarkindajn progresojn kaj ĝia jara produktovaloro de industrio kaj agrikulturo superis 100 miliardojn da juanoj. Ĝi okupas la kvaran lokon tiurilate en la lando, nur post Ŝanhajo, Pekino kaj Tianjin (Tjanĝin).


En la urbo Kunshan sub Suzhou estas ekonomia kaj teknika regiono ekspluatata mempage. Ĝi aperis sen sankcio de la ŝtato kaj ties financado. Tamen, en 1991 la jara industria produktovaloro de

la urbo atingis proksimume 1.2 miliardojn da juanoj. Kompare kun tiuj de la 14 ĉemaraj ekspluataj regionoj sankciitaj de la ŝtato, ĝi okupas la kvinan lokon. Laŭ antaŭkalkulo, en 1995 ĝia jara industria produktovaloro atingos 5 miliardojn da juanoj, egale al la totala produktovaloro de industrio kaj agrikulturo de la urbo en 1990.


La naturdotita urbo Zhangjiagang (Ĝangĝjagang) sub Suzhou havas profundan havenon de enlanda rivero. En seka sezono ĝi profundas 13-14 metrojn. Eĉ 8-gradaj vento ne povas malhelpi ĝian funkciadon. Antaŭ dek jaroj tie regis plena kvieteco. Sed post kiam la unua alilanda kargoŝipo ankriĝis tie, la urbo ekviglis.

Oktobre de 1992 la ŝtato decidis fondi doganliberan regionon en la urbo Zhangjiagang. Ĝi estas la unika doganlibera regiono ĉe enlanda rivero de Ĉinio kaj ankaŭ la plej granda el la doganliberaj regionoj de la lando. Ĝi havas la funkcion de komerco, staplado kaj prilaborado de eksportaĵoj. Duonjaron post la fondiĝo de la regiono, estis garantiataj la provizo de akvo kaj elektro, facileco de trafiko kaj komunikado, kun alilanda kapitalo de almenaŭ 700 milionoj da juanoj. Oni kontraktis pli ol 100 interkonsentojn pri projektoj investitaj de ĉinaj kaj alilandaj entre-

SKEMA MAPO DE LOKOJ ĈE YANGZI-RIVERO



1. Suzhou 2. Wuxi 3. Changzhou



La Azia Filmo-urbo

pretoj, luigis du trionojn de la tero kaj komencis konstrui 21 bazajn instalaĵojn de komerco, financo, komerc-traktejo kaj staplejo kun totala investo de 2.5 miliardoj da juanoj. Ĉio ĉi estis farata kun la rapideco malofte vidita en Ĉinio.

Suzhou estas ankaŭ turisma urbo fame konata en la mondo. En ĝia malnova parto iam kuŝis centoj da ĉinaj klasikaj ĝardenoj, kiuj donis al la urbo elegantecon kaj kvietecon. En la lastaj jaroj oni malfermis novan distrikton kun areo de 15 kvadrataj kilometroj. Laŭ la plano, la totala industria kaj agrikultura produktov valoro de la nova distrikto estos 15 miliardoj da juanoj fine de la kura jarcento kaj ĝi atingos la ekonomian kaj vivan nivelojn de la nuna Hongkong post 20 jaroj. Tio bazas sin sur la jeno: Kiel Ŝanhajo, ankaŭ Suzhou estas urbo kun alta klereco. Sed la ĉefa parto de la ekonomio de Suzhou konsistas el vigleplenaj kaj altgradaj vilaĝaj entreprenoj, kiuj havas grandan liberecon en administrado kaj pli konformas al la bezono de internacia merkato. Por prosperigi la urbon estas kon-

struitaj en ĝi tri elirejoj de la ekspresa aŭtovojo de Nankino, la ĉefurbo de Jiangsu (Ĝjansu)-provinco, al Ŝanhajo (la aŭtovojo havas sume sep elirejojn).

VILAĜAJ ENTREPRENOJ EN WUXI

Wuxi, kiel lulilo de la ĉina nacia industrio, nomiĝas ankaŭ "silka urbo" kaj "ŝtofa kajo". En 1981 ĝi fariĝis unu el la 15 ekonomiaj centroj de Ĉinio. Fine de 1993 la pokapa totala valoro de la nacia produktado estis 9 000 juanoj.

Pro kio la ekonomio de Wuxi disvolviĝis tiel rapide? Tion kaŭzis ĉefe la apero de vilaĝaj entreprenoj.

Komence la entreprenoj plejparte estis funkciigataj de vilaĝegoj aŭ subdistriktoj, kies kamparanoj mem investis por funkciigi la entreprenojn kaj respondecis pri la profito kaj perdo. Por havi krudmaterialojn kaj oferti produktaĵojn, kamparanoj-entreprenistoj vizitis multajn lokojn de la lando, dank' al kio la vilaĝaj entreprenoj rapide disvolviĝis. En 1993 Wuxi-gubernio havis 5 200 vilaĝajn entreprenojn


kun totala kapitalo de 15 miliardoj da juanoj. De la pasintaj jaroj la gubernio praktikas la strategian principon raciigi la entreprenan strukturon kaj grandigi la ekonomian skalon por rapide disvolvi la vilaĝajn entreprenojn. Ĝi funkciigas la konfekcian fabrikon Hongdou, kaŭĉukan fabrikon Feida kaj aliajn dek fortajn entreprenajn grupojn, kun jara produktov valoro de minimume miliardo da juanoj.

Ĉiu el la 120 gubernioj kaj vilaĝoj de la urbo havas entreprenon funkciigatan per ekstera kapitalo. Iu el ili funkciigas eĉ pli ol 20 poreksportajn entreprenojn. Per tio ili ne nur enkondukas kapitalon, avangardajn instalaĵojn, teknologiojn kaj administratajn spertojn, sed ankaŭ ĝuas avantaĝojn.

NOVA ASPEKTO DE CHANGZHOU

Changzhou, Suzhou kaj Wuxi estas proksime unu de alia kaj havas similecon en ekonomiaj medio kaj strukturo. Kio do estas la supereco de Changzhou? Inter la tri urboj Changzhou estas plej proksime de Yangzi-rivero kaj distancas de ĝi nur 18 kilometrojn. La urbo havas river-bordon longan je 18 km. Tial la urbo komencis sian entreprenadon per haven-konstruado.

Konforme al la konstruado, oni starigis ĉe la bordo de la rivero grandan industrian ekspluatatan regionon kaj ekfunkciigis kemiindustrion kaj aliajn grandajn entreprenojn. Samtempe oni komencis konstrui alt- kaj nov-teknikan ekspluatatan regionon norde de la malnova parto de la urbo. Nun la regiono estas sankciita de la Ŝtata Konsilantaro kiel ŝtata ekspluatata regiono. Inter la industria kaj alt- kaj nov-teknika regionoj fondiĝis ekonomia kaj teknika ekspluatata regiono kun areo de 20 kvadrataj kilometroj.



En fabriko de polipropilenaj fibroj en Changshu



En vestofarejo funkciigata de entreprenistoj de Changshu kaj Usono




En fabriko de eskalatoroj funkciigata de Suzhou kaj Svisio

La tri ekspluataj regionoj formas "tri punktojn" de sude norden. La regionojn trakuras 80-metre larĝa ŝoseo al la rivero.

Laŭ la plano la alt- kaj nov-teknika regiono konsistos el la regionoj de elektronika informadiko, unuigitaj fotoelektro kaj elektromekaniko, novaj materialoj, nova energio kaj altfika energio-ŝparo, bioingenierio kaj farmacio, aeronautiko kaj astronautiko kaj doganlibera staplojo kaj ĝardeno de novaj teknikoj.


Je mencio pri la superecoj de la alt- kaj nov-teknika regiono, s-ro Meng, urbestro de Changzhou, diris: "Unue, la regiono havas idealan situon kaj facilan trafikon. Due, plene utiligeblas ĉiuj ekzistantaj instalaĵoj de la urbo. Trie, la urbo progresas en scienco kaj tekniko, kiuj multe kontribuis al kresko de la industrioj, kaj unuapaŝe formiĝis merkata sistemo favora al la disvolviĝo de altaj kaj novaj teknikoj. ■





Sur kajo de Zhangjiagang-haveno

En muntejo de televidiloj en Kunshan



Akvo, pli kara ol oro

STOKHOLMO famiĝas per siaj akvoj. Oni kutime nomas ĝin Venecio en la norda Eŭropo. En la aŭgusta Akva Festivalo, la urbo fariĝas paradizo sur akvo, en kies ĉarma atmosfero dronas miloj kaj miloj da vizitantoj.

Sed aŭguste de 1993, en la Popola Halo en la urbocentro, fakuloj de media protekto invitatitaj el diversaj landoj al la Akva Festivalo rakontis al ni alian perspektivon:

La akvofonto malmultiĝas. Nur 2.6% de la akvo sur la kontinentoj ne estas poluciitaj, kaj 99% el tiuj 2.6 procentoj estas aŭ glacio aŭ profunde kaŝitaj sub la tero. Tio signifas, ke malpli ol 1 procento de la surtera akvo taŭgas por trinki, kaj ankaŭ tiu ĉi parto pli kaj pli malmultiĝas.

La loĝantaro sur la tero multiĝas, sekve uzkvanto de akvo grandiĝas. En 1950 la uzkvanto de akvo de la tuta mondo estis 1 360 kubkilometroj, sed en 1990 la kvanto atingis 4 340 kubkilometrojn. Laŭ kalkulo la kvanto pliiĝos je 1 000 kubkilometroj en 2000. Antaŭ nelonge nur la malriĉaj kaj sekaj evoluantaj landoj suferis de manko de akvo. Nun ankaŭ multaj evoluantaj landoj bezonas cerbumi super akvoŝparado. Ĉirkaŭ triono de la tero suferas krizon de manko de akvo.

La kvalito de akvo malboniĝas. La surtera akvofonto frontas kontraŭ la minaco de poluciita akvo de la industrio, agrikulturo

kaj urbo. Ĉiujare pli ol 10 milionoj da homoj en la mondo mortas pro poluciita akvo, kaj plejparto el ili estas infanoj. Pli ol 1 200 milionoj da homoj devigite trinkas akvon ne konforman al la normo. En iuj evoluantaj landoj venenaj insekticidoj estas vaste uzataj. Pro manko de akvo iuj regionoj eĉ irigacias la kampojn per poluciita akvo ellasita de urboj. De 1964 ĝis 1984, la uzkvanto de kemisterko en la okcidenta Eŭropo duobliĝis. Laŭ prognozo de iu esplora instituto, en la venontaj 50 jaroj, se la eŭropaj landoj ne aplikos efikajn rimedojn, ĉirkaŭ 20-150 miloj da kubkilometroj da subtera akvo estos poluciita. Eĉ en la skandinaviaj landoj, kiuj estas vaste laŭdataj pro la media protekto, acida pluvo severe malboniĝas la kvaliton de la surtera akvo.

La krizo de manko de akvo atentigas pli kaj pli multajn homojn, ke la akvofonta protekto decidas la ekziston de la homaro. En la pasintaj jaroj, multaj landoj rigardis la akvofontan protekton kaj akvoŝparadon kiel gravajn projektojn por sia disvolvigo. Por altigi la kvaliton de trin-

kakvo, la Unuigintaj Nacioj difinis, ke la dek jaroj de 1981 ĝis 1990 estas jaroj por plibonigo de trinkakvo. En la 10 jaroj 1 300 milionoj da homoj en la evoluantaj landoj povis akiri puran trinkakvon.

Multaj landoj akcentas akvoŝparadon en produktado. 69% de la akvo estas uzataj de agrikulturo, 23% de industrio kaj 8% de la ĉiutaga vivo de la homoj. Fakuloj taksis, ke ankoraŭ 10% ĝis 50% de la uzkvanto por la agrikulturo estos ŝpareblaj. Se la celo estos atingita, la krizo de akvomanko malstreĉiĝos. En la akvouzado de industrio, la fakuloj atentigas, ke la evoluantaj landoj ĉerpu lecionon de la evoluantaj landoj. Dume gravas ankaŭ enradikigi la koncepton de akvoŝparado en la koron de la popolo. Artikolo publikigita en la gazeto por la Akva Festivalo opiniis, ke antaŭe oni ofte diris "trinkante akvon, ne forgesu la putofosinton", kaj nun oni devas aldoni "trinkante akvon, ne forgesu la posteulojn".

Oni devas kompreni, ke la homaro frontas kontraŭ ekstreme malfacilan taskon por akvofonta protekto kaj forigo de polucio. Por la evoluantaj landoj, aparte grave estas sinkronigi median protekton kun la ekonomia disvolvigo.

Akvo estas pli kara ol oro. Eble iuj opinias, ke tio estas sensacio. Sciencistoj volas per ĝi rimarkigi nin, ke ni nepre kunlaboru por protekti la akvan riĉfonton, dank' al kiu la homoj ekzistas, ĉar ni havas nur unu terglobon. ■

Solvo de "DEMANDOJ" por la konkurso de EPĈ- legado en la 11-a numero de 1993

1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11	12	13	14	15
C	B	B	A	C	A	C	B	A	A	C	B	B	A	C

Por allogi eksterajn investantojn

de REN HUI

DE post 1993, kiam la sumo de la investaĵoj de entreprenistoj de aliaj landoj, Hongkong kaj Taiwan unufoje superis monsumon pruntitan de Ĉinio el aliaj landoj kaj regionoj, la ekstera investado jam fariĝis la ĉefa maniero de Ĉinio por utiligi eksteran kapitalon. Laŭ statistiko, ĝis la fino de junio de 1993, la ĉina registaro sankciis 130 000 projektojn investitajn de entreprenistoj el la Sudorienta Azio, Eŭropo, Ameriko, Japanio, Hongkong kaj Taiwan, kun investosumo de pli ol 40 miliardoj da usonaj dolaroj. La projektoj dislokiĝas en la malfermaj urboj, specialaj ekonomiaj regionoj, ĉemaraj ekspluatataj regionoj kaj eĉ landinterno.

Helpe de la investo, la ĉina ekonomio ekvigliĝis. Dank' al la politiko de reformado kaj pordmalfermo, ĝi rapide disvolviĝas. Sed manko de mono malhelpas la ĉinan konstruadon. La ekstera kapitalo plenigis la mankon iagrade kaj premisis la rapidan progreson de la ĉina ekonomio. En la lastaj dekkelkaj jaroj, dank'al ekstera kapitalo, multe ŝanĝiĝis la aspekto de ĉemaraj regionoj de Ĉinio, kiaj Shenzhen de Guangdong kaj Xiamen (Ŝjamen) de Fujian (Fuĝjan), kie la ekonomia bazo estis malsolida.

Nun la entreprenoj, investitaj kaj funkciigataj de alilandanoj mem aŭ de ĉinoj kaj alilandanoj kune, fariĝis ĉefa deveno de la enspezo kaj ekstera komerco de Ĉinio. En la lastaj jaroj la imposto de la entreprenoj funkciigataj de eksteraj entreprenistoj al la ŝtato kres-

kis je pli ol 40% ĉiujare. En 1991, la eksterakomerca valoro de supre menciitaj entreprenoj konsistigis 15% de tiu de Ĉinio.

Krom la ekstera kapitalo, enkondukiĝis en Ĉinion ankaŭ avangardaj teknikoj, instalaĵoj, administraj spertoj. Ekz., en Ŝanhajo, 85% de la produktaĵoj de la entreprenoj funkciigataj de eksteraj entreprenistoj atingis aŭ preskaŭ atingis la internacian nivelon. Ŝanhaja aŭtofabrikanto enkondukis la aŭton "Santana" de Germanio, tiel ke la tiea aŭtofabrikado rapide disvolviĝis. Tie la eksteraj entreprenistoj pri vestoj, ŝuoj kaj kosmetikaĵoj ne nur organizis la produktadon per novaj teknologioj, sed ankaŭ vekis atenton per novstilaj projektoj kaj produktaĵoj, ke la enlandaj samspecaj produktaĵoj disvolviĝis al nova generacio. Aliflanke, tiuj entreprenoj elkulturis nombron da kompetentuloj kun modernaj administraj scioj kaj la kapablo administri entreprenon konforme al internaciaj konvencioj.

Nun la problemoj en la ekstera investado estas jene:

1. Ne ĉiuj promesitaj investaĵoj atingis Ĉinion. En 1992 nur 41.5% de la investaĵoj de eksteraj entreprenistoj estis uzataj.

2. Malgranda skalo de investado. Pro neforta kapitalo kaj nesufiĉe avangarda tekniko, granda nombro da entreprenoj okupiĝis per prilaborado, sen skala profito. Cetere, ili konsumis sufiĉan kvanton da energio. Rezulte de tio, grandaj konsorcioj ne havis la kuraĝon fari investadon al ili.

3. Neracia dispozicio de eksteraj

investaĵoj. Tre malgranda parto de ili estis uzata en agrikulturo; granda parto en prilaborado; kaj la alia parto koncentrite en dombiena komerco kaj turismo. Kaj krome, oni malmulte investis por la landinterno kaj okcidenta parto de Ĉinio.

4. Neperfekta leĝsistemo. Ofte okazis, ke eksteraj entreprenistoj fraŭdis la ŝtaton pri siaj impostoj.

5. Neraciaj difinoj pri favoreco al entreprenoj investitaj de eksteraj entreprenistoj. Okazis, ke la ŝtato donis monhelpon al la entreprenoj, ke ili neegale konkurencas kun ŝtataj entreprenoj.

Rilate al la nuna stato de utiligo de ekstera kapitalo, multaj ekonomikaj fakuloj donis proponojn al la registaro. Post tio koncernaj departementoj emfazis, ke por utiligi eksteran kapitalon oni devas havi malproksimvidecon, fari la enkondukadon laŭ sia kapablo, perfektigi la servan sistemon kaj pluapase plibonigi la investan medion. En la landinterno oni devas plifortigi la konstruadon de la fundamentaj instalaĵoj de trafiko, energifonto kaj komuniko, labori laŭ internaciaj konvencio kaj leĝo, racie utiligi eksteran kapitalon kaj reguligi la favorajn politikojn por allogi alilandajn investantojn. Baldaŭ estos publikigitaj la dokumentoj "Regulano por Direkti Investadon de Eksteraj Entreprenistoj (Projekto)" kaj "Gvidkatalogo de 1993-1995 por Entreprenej Investitaj de Aliaj landoj kaj Regionoj". La dokumentoj difinas la projektojn, al kiuj la registaro limigas, permesas aŭ malpermesas eksteran investadon. Tio ludos gravan rolon por pli bone enkonduki kaj utiligi eksteran kapitalon. ■

SUR SCENEJO


Ĉinaj akrobataĵoj

Akrobataĵoj estas malnova arto de la mondo, ŝatata de ĉiuj popoloj. La ĉina akrobatiko naskiĝis antaŭ 5 000 jaroj kaj estas nomata "Arta Perlo de la Oriento".


Kiel aparta arto, akrobataĵoj estas prezentataj de tiuj, kiuj havas mirindan lertecon kaj kiujn oni rigardas superhomoj. De antikve la ĉinaj akrobatoj prenas eminentan arton kiel sian vivon kaj allogas la rigardantojn per sia neimageble malfacila prezentado. Dum miloj da jaroj multaj oferis sian vivon por perfektigi la arton. Sekvante ilian ekzemplon, la posteuloj diligente laboras, ke la arto herediĝas de generacio al generacio.

Sur seĝoj

Triopa ludo





Fotoj de LIU SIGONG




Traigo tra tubo

Ekvilibrigo de stango sur la kapo



Balancado

Turnado de teleroj



LI QIANG:

Brila perlo en profunda montaro

LA Malgranda Suda Maro, nomata kiel brila perlo en profunda montaro, situas en Qianjiang-gubernio, Sichuan-provinco, sudokcidente de Ĉinio. Ĝi estas malgranda dolĉakva lago en montaro. Dank' al siaj belaj aspektoj kaj mirinda topografio, ĝi fariĝis pli kaj pli fama en la lastaj jaroj kaj estas konsiderita kiel turisma vidindejo de Sichuan-provinco, ne nur pro tio, ke ĝi kaŝiĝas en montaro, kun gracieco dotita de la naturo, sed ankaŭ pro tio, ke ĝi formiĝis en granda tertremo. Ĉi tie vidiĝas postsignoj de la tertremo.

Historia materialo tiel notis, ke antaŭtagmeze de la 10-a de la sesa monato de 1856, "subite forte tremis la tero, disfalis la monto de Houba-vilaĝo". "Kelkajn tagojn antaŭe, la sunlumo estis malhela, leviĝis nebulo, kaj en tiu tago la nebulo fariĝis pli densa. Antaŭtagmeze, subite leviĝis tondra bruego, la domoj skuiĝis kaj disfalis la tegoloj, akvo en basenoj ondiĝis, la loĝantoj fuĝis en teruriĝo, sed ili falis teren kaj ne povis stariĝi. El

rivereto en Xujiawan de Houba leviĝis monto kun tondra bruego kaj rompiĝis kvazaŭ hakite, ŝtonoj ĵetiĝis el la tero kaj pereigis dekojn da familioj. Ŝtopiĝis la rivereto." Pro tertremo kaj montofalo, ŝtopiĝis la rivereto, kaj en somero pluvo fluis en la blokitan rivereton kaj formis lagon kun longo de ĉ. 10 km. Kaj la kampoj kaj la domoj estis inunditaj de la akvo. De tiam aperis lago en profunda montaro, nomata Malgranda Suda Maro.

Hodiaŭ oni vidas, ke ambaŭflanke de la lagobuŝo gardostaras nudaj apikaj klifoj kreitaj de montofalo. Sur la montokresto kuŝas 2 gigantaj ŝtonoj similaj al la tegmento de palankeno, trafikilo en la malnova Ĉinio. Pro tio oni nomas la monton Tegmenta Monto. Malsupre de la ŝtonoj, flanke de la aŭtovojo en la valo malorde dislokiĝas grandaj ŝtonoj, ŝajne, ke en ajna momento la tero denove tremus, la montoj skuiĝus kaj ŝtonoj ruliĝus. Sed okcidente de la monto etendiĝas kvieta lago, kvazaŭ safiro inkrustita en montaro, la lago ŝanĝbrilas en la suno.

En la buŝo de la lago arbore staras diversformaj rifoj. Kiam fiŝŝipoj kaj plezurŝipoj enlaciĝas, ili devas unue ĉirkaŭiri tiujn rifojn. Nemalmultaj insuletoj punktatas la lagon, el ili la tri plej grandaj nomiĝas Papilio, Cikonia Promenejo kaj Bubala Dorso.

Sur Papilio-insulo estas sidejo de la Fiŝbredejo de la Malgranda Suda Maro. Tie troviĝas domoj, fiŝbasenoj, rizkampoj, fruktoĝardenoj, bambuaroj, arbaroj ktp. Laŭdire tiu malgranda insulo similas al fluganta papilio, kiam oni ĝin rigardas de sur alta monto sude de la lago.

Ĉe la loko plej larĝa de la lago sidas ronda insuleto. Oni nomas ĝin Cikonia Promenejo, ĉar tie ofte ripozas grizaj cikonioj. Kiam la boato albordiĝas, turistoj supreniras laŭ ŝtuparo kaj ĝuas en kiosko variantan pejzaĝon de la lago.

Sur la insulo Bubala Dorso, la plej granda en la okcidenta parto de la lago ombras pinaro kaj prospera fruktarbaro, kaj en densaj verdaĵoj serpentas vojetoj. Rigardante la insulon sur pinto de ĉirkaŭaj montoj, oni rimarkis, ke ĝi similas al bubalo sin bananta en akvo, kaj ĝi, turnante la kapon, rigardas la rondan Cikonian Promenejon. Tion oni nomas "Bubalo rigardanta la lunon". La insulo jam fariĝis unu el la dek vidindejoj de la Malgranda Suda Maro.

Pejzaĝoj de ĉiuj sezonoj de la loko estas ĉarmaj. Printempe prosperas floroj kaj densas vegetaloj, somere abundas akvo, aŭtune ruĝas arbofolioj sur verdaj montoj, vintre arĝente blankas neĝkovritaj pintoj. En la ĉirkaŭaj montoj vivas tuĝja-oj, mjaŭ-oj, hanoj kaj membroj de aliaj nacioj. La natureco de la loko allogas pli kaj pli multajn turistojn, kiuj raviĝas de la Malgranda Suda Maro. ■

La turisma loko Malgranda Suda Maro





Hani-a vilaĝo

Teksto de WANG DONGYAN

Fotoj de YANG CHANGFU

LA Ailao-a montregiono en la suda parto de Yunnan-provinco estas bela kaj fekunda kun milda klimato kaj densaj arbaroj. Ĉi tie loĝas hani-oj, unu el la ĉinaj naci-malplimultoj. La hani-oj estas serenaj, fervoraj kaj honestaj. Ili vivas kiel en granda familio. Tion bone manifestis ilia longdraka festeno.

La festeno okazas kelkajn fojojn ĉiujare. Por soleni la Printempan Feston, siajn sesamonatan kaj dekamonatan festojn laŭ la ĉina luna kalendaro, la hani-oj eldomigas tablojn, kunigas ilin unuj kun la aliaj kaj fine aperas longa tablaro sur la vilaĝa strato por la festeno. Ĉar la festena tablaro estas tre longa, oni nomas ĝin longdraka festeno. Ĉiuj vilaĝanoj eldomiĝas por kune celebri la feston.

Frumatene, oni purigas la vilaĝon kaj portas novajn naci-stilajn vestojn. La knabinoj surhavas kapvestojn kun brilaj arĝentaĵoj kaj vestojn kun arĝentaj longaj ĉenoj tintantaj ĉe ĉiu paŝo. Viglaj knaboj laŭvice tamburadas kaj gongadas ĉe vilaĝlimo, ju pli fore la sono aŭdiĝas, des pli riĉa montriĝas la vilaĝo.

La vino kaj pladoj de la festeno estas preparitaj de hani-oj mem. Kiu preparas pli da bongustaj pladoj, tiu sentas sin fiera. Tial oni ŝtele konkuras por

doni la abundajn pladojn. Poste estroj de ĉiuj familioj metas sur la tablon la memfaritan sorg-vinon kaj diversajn pladojn. Sur ĉiu tablo aromas almenaŭ 20 pladoj.

Ĉe la komenco de la festeno oni sidigas 2 respektindajn maljunulojn sur honora sidloko, kiuj do funkcias kiel prezidantoj de la festeno. Ili noblaj kaj altprestigaĵas devas ne nur havi filojn kaj nepojn, sed ankaŭ esti laboremaj en terkulturo, lertaj en administrado de hejmaj aferoj. Gvidate de ili, oni altblistiĝas. Ĉe la tablo la maljunuloj familiare interparolas kaj patrinoj de infanoj babilas pri hejmaj aferoj, dum gejunuloj ĝoje ŝercadas. En la tuta vilaĝo regas solidareco kaj gajeco.

Post kiam la festen-prezidantoj faris salutvortojn, oni krias "Ŝaŝoŭlŭo!". Tiu solena kaj kruda krio signifas adiaŭi la malnovan jaron kaj bonvenigi la novan kaj celebri la riĉan rikolton. La longdraka festeno komenciĝas per manĝo de gluecariza bulo, tio signifas, ke ĉiuj vilaĝanoj forte unuiĝas kiel gluecariza bulo.

La hani-oj kutime manĝas 2 bovlojn da rizo, eĉ se oni manĝas tre malmulte, ili ankaŭ devas 2-foje preni la manĝaĵon, ĉar ili opinias, ke en la mondo nur 2 specoj da homoj manĝas unu bovlon da rizo,



Longdraka festeno

t.e. malliberuloj kaj almozuloj. Tial oni nepre aldonas al vi manĝaĵojn, kiam vi gastas ĉe hani-oj. Ĉe la tablo junuloj aldonas de tempo al tempo vinon kaj manĝaĵojn al maljunuloj kaj gastoj. Kiam maljunuloj per unu spiro ĝoje eltrinkas la glason, ĉiuj ĉesstantoj ĝoje huraas. En la vilaĝo regas gaja kaj feliĉa atmosfero.

Post manĝo aŭdiĝas tamburado kaj gongado. La 2 prezidantoj ekdancas laŭ takto de la tamburado, dum la aliaj krias ŝaŝouŭon por ilin akompani. Post

kiam ili finas sian dancon ĉirkaŭ la festenejo, ankaŭ aliaj ekdancas, svingante poŝtukon. Tio plene montras la unuecon, reciprokan helpon de hani-oj, ilian amon al la vivo kaj prosperon de la vilaĝo. La festeno daŭras ĝis la sunsubiro.

Nokte oni bruligas tendarfajrojn. Ĉe la tendarfajro gejunuloj frapas tamburojn el bovfelo kaj gongojn, ludas 3-kordajn instrumentojn, blovas bambuajn flutojn, kantas hani-ajn popolkantojn kaj dancas belajn dancojn. Ĝenerale, la gaja celebrado daŭras ĝis sunleviĝo en la sekvanta mateno. ■



Pro amikeco



En drinkludo dum la festeno



Preparo de longdraka festeno



Virinoj laborantaj por longdraka festeno

Ĉinaj sciencistinoj



S-ino Zhu Lilan (maldekstre) kaj ŝia edzo prof. Fan Yuezuo

DE la lastaj jaroj, kiel grava forto de la ĉina moderniga konstruado, 206 600 sciencistinoj laboras en scienc-esploraj fakoj. Ili konsistigas 38.4% de la totala nombro de sciencistoj de Ĉinio. Multaj sciencistinoj atingis gravan sukceson en la kampo de altaj teknikoj.

Membro de la Ĉina Akademio de Sciencoj estas la plej alta kaj plej aŭtoritata titolo de la ĉinaj sciencistoj. En la komenco de 1984 estis 379 membroj de la Ĉina Akademio de Sciencoj, inter kiuj estis 14 sciencistinoj. Inter la 210 akademianoj alelektitaj en 1992 estis 12 virinoj. Sciencistinoj laboras en la kampoj de astronomio, geologio, kemio, fiziko, matematiko, biologio, biokemio, komputero, integra cirkvito k.a. Inter ili la plej juna estas 43-jara profesoro Zhao Yufen (Ĝaŭ Jufen) de la kemia fakultato de Qinghua-universitato. En februaro 1993,

kune kun aliaj kvin junaj sciencistoj ŝi ricevis la "Premion de Ĉina Juna Sciencisto".


Inter la gajnintoj de alta akademia rango pli kaj pli multiĝis virinoj. De 1982 ĝis 1987 Ĉinio aljuĝis doktorecon al 1 265 sciencistoj, inter kiuj estis 88 virinoj. En 1989 Ĉinio havis pli ol 300 doktorinojn. Doktorinoj, elkulturitaj de Ĉinio, kiaj Xu Qiaogong (Ŝju Ĉjaŭgong) kaj Gao Ge, akiris gravan sukceson en scienc-esplorado kaj produktado. Lastatempe Zhao Yufen kaj aliaj junaj sciencistinoj ricevis ankaŭ la "Premion de Scienco kaj Tekniko por Junuloj" donitan de la Ĉina Scienc-teknika Asocio.

Ĉinaj sciencistinoj estas multe laŭdataj kaj konfeditaj pro siaj sukcesoj. En la Ĉina Akademio de Sciencoj ĉ. 3 000 sciencistinoj ricevis altan profesion rangon; 286 sciencistinoj funkcias kiel estro aŭ vicestro de la oficejoj; kaj 514 sciencistinoj kiel respondeculo de scienc-esplora temo. En la Ĉina Akademio de Medicinaj

Sciencoj pli ol 40% de la laborantinoj ricevis altan profesion rangon. En 1990 la akademio havis 112 gravajn scienc-esplorajn temojn. 47.3% de la respondeculoj pri la temoj estis virinoj.

En la kampo de la nacidefenda scienco estas pli ol 10 000 laborantinoj, inter kiuj centoj da sciencistinoj funkcias kiel respondeculo de scienc-esplora temo aŭ kiel estrino de la oficejo. Multaj sciencistinoj ludas gravan rolon en universitatoj kaj scienc-esploraj fakoj. Ekzemple, en satelito-lanĉa centro de Sichuan-provinco 400 sciencistinoj fariĝis ĉefa forto en la astronautika eksperimento. En la Ĉina Akademio de Atomenergiaj Sciencoj iuj sciencistinoj akiris multajn sukcesojn en analizo pri fuelo, esplorado pri radiada kemio kaj magneta disociado de izotopoj en nuklea fiziko k.a.

D-ino Yang Hong en la Ĉina Agronomia Akademio sukcese elkulturis novan specon de rizo kapablan rezisti kontraŭ piraloj.



Lai Luhua de la kemia fakultato de la Pekina Universitato estas plej juna ĉina profesorino.

Tio estas grava frukto en la alt-teknika kampo de Ĉinio. D-ino Sun Junhong (Sun Ĝjunhong) atingis la internacian nivelon en esplorado de hepata transplanto.

Profesorino Lin Lanying, vic-prezidanto de la Ĉina Scienc-teknika Asocio, opinias, ke granda nombro da sciencistinoj markis la leviĝon de la kvalito de la ĉinaj virinoj; la vekigo de la memkonscio de la virinoj estas nedisigebla de la zorgado de la ŝtato al la sciencistinoj, ekzemple, la ŝtato jam difinis, ke la altklasaj intelektulinoj povas emeritiĝi en la aĝo samgranda kiel tiu de la viroj.

Same kiel ĉiuj aliaj profesiaj virinoj, la ĉinaj sciencistinoj neeviteble alfrontas la kontraŭdirojn inter la dommastrumaj kaj profesiaj laboroj. Kvankam plejparto el ili bone scias trakti tiujn malfacilojn, tamen ili devas pli multe sin dediĉi ol la viroj. Tion multe spertis Zhu Lilan, konstanta vicestrino de la

Nacia Scienc-teknika Komisiono de Ĉinio. Antaŭe ŝi funkciis kiel estrino de la Kemia Instituto sub la Ĉina Akademio de Sciencoj, kaj antaŭ sep jaroj ŝi prenis sur sin la oficon. Foje, alilandano demandis ŝin: “Ĉu multaj estas en Ĉinio la virinoj, kia vi?” Ŝi ridete respondis: “Kompreneble, malpli multaj ol la viroj!” “Kial?” Plue demandis la alilandano. S-ino Zhu respondis: “Ĉar mi havas bonan edzon. Li komprenas min.” Ŝia edzo estas profesoro de la Astronaŭtika Universitato. Kvankam li havas penigan instruadon kaj scienc-esploran taskon, tamen li plenumas multe da hejmlaboroj. Profesorino Zhu Lilan kiel eble plej multe faras hejmlaborojn en libera tempo por malŝargi sian edzon.

Iuj diris, ke ĉiu sukcesinta viro havas bonan edzinon. Kiel do statas ĉiu sukcesinta virino? Kiel diris profesorino Mao Jianqin (Maŭ Ĝjanĉin), “Sen familia amo estas malfacile por virino atingi sukceson en sia kariero.”

Profesorino Zhu Lilan opinias, ke por plene disvolvi sian talenton virino devas ĉasi altajn nivelon, efikon kaj rapidecon. Por tiu celo ŝi devas havi firman volon kaj memfidon. Nun multe temas pri egalrajta konkurado. Fakte, ankoraŭ ekzistas evidenta maljusteco inter viroj kaj virinoj. Ni prenu kiel ekzemplon la jenon: Ju pli altgradaj estas akademaj fakoj, des pli malmultaj sciencistinoj en ili. Kvankam virinoj konsistigas trionon de la sciencistoj de Ĉinio, tamen la nombro de virinoj havantaj altan profesion rangon ne atingas 10% de la altklasaj intelektuloj en la tuta lando. Por akiri sukceson virinoj devas dediĉi pli multe da energio ol viroj.

Zhu Lilan opinias ankaŭ, ke en multaj scienc-teknikaj kampoj, kiaj elektronika informadiko kaj biologio, la virinoj estas eĉ iom pli superaj ol la viroj. Kredeble, la virinoj ludos pli kaj pli gravan rolon en la scienc-teknika kampo kaj havos pli kaj pli altan socian pozicion. ■

Knabinoj plukantaj tefoliojn



En elementa lernejo

Reciprokado de kantoj



Ŝe-oj en orienta Fujian

Fotoj de LI CHUNGENG

Ĉinio havas 56 naciojn, inter kiuj ŝe-nacio havas 400 000 membrojn. Nun pli ol 160 000 ŝe-oj vivas en Ningde kaj aliaj lokoj de orienta Fujian (Fuĝjan).

La ŝe-oj havas sian parolan lingvon, sed ne skriban. Ili uzas la ideogramojn de la han-oj. La ŝe-aj virinoj portas nigrajn vestojn kun buntaj pasamentoj ĉe la rando de kolumo kaj brusto. La knabinoj ŝatas harplektaĵon volvitan sur la kapo kaj ornamitan per ruĝaj bulboj aŭ kvasto kaj la edziniĝintaj virinoj hartuberon kun arĝenta broĉo.

La ŝe-oj estas bonkoraj, optimismaj, honestaj kaj gastamaj. Ili ŝatas kanti unu al alia, precipe en festotagoj.



Maljunulino bredanta kokojn

En vilaĝo de ŝe-oj




Kultura monumento de Ĉinio

ONI povas diri, ke sen-nombraj ĉinaj intelektuloj revis ĉ. 100 jarojn pri enciklopedio kompilita de ĉinoj mem.

La revo finfine realiĝis la 21-an de aŭgusto 1993. Tiun tagon aperis “Granda Ĉina Enciklopedio” el 74 volumoj (krom tiu de indekso). Kun 77 859 artikoloj, 120 milionoj da ĉinaj ideogramoj kaj 49 765 bildoj ĝi enhavas filozofion, socian sciencan, literaturon kaj arton, edukon, naturan sciencan, inĝenierion kaj aliajn 60 fakojn. Ĝi enhavas la plej novajn sciencajn kaj kulturajn fruktojn de la mondo kaj prezentas la nivelon de scienca esplorado de la ĉinaj intelektuloj dum kelkdek jaroj. Por plenumi ĝin pli ol 20 000 ĉinaj intelektuloj laboris 15 jarojn. Finfine ili sukcesis kompili la enciklopedion kaj per tio starigis kulturemon de Ĉinio.

Enciklopedio, kiel “universitato sen ĉirkaŭmuroj” kaj “trezorejo de homaj sciencoj”, spegulas la kulturemon de lando kaj la kulturemon de nacio. Pro tio multaj landoj rigardas ĝin gravega kulturema konstruo. Post kiam franca filozofo Diderot kompilis la unuan grandan enciklopedion en la 18-a jarcento, kelkdek landoj eldonis la sian. Sed sur la longa bretaro de UN por enciklopedioj ne troviĝas enciklopedio de Ĉinio, kiu havas 5 000-jaran civilizacion.

Fakte, ĉinaj intelektuloj de longe deziris kompili enciklope-



Specimenoj de “Granda Ĉina Enciklopedio”

dion de Ĉinio. En 1917 s-ro Cai Yuanpei, fama ĉina edukisto kaj pensulo, proponis kompili ĉinan propran enciklopedion. Poste, multaj intelektuloj plurfoje esprimis la saman deziron, sed ĝi ne realiĝis pro diversaj kialoj.

En 1978, kiam ekpraktikiĝis en Ĉinio reformado kaj pordomalfermo, la Ĉina Akademio de Sciencoj, la Ĉina Akademio de Sociaj Sciencoj kaj la Nacia Eldona Buroo de Ĉinio refoje proponis kompili “Grandan Ĉinan Enciklopedion”. Koncerna departemento de la ĉina registaro sankciis tion kaj decidis fondi la Redaktan Komisionon kaj la Eldonejon de la Granda Ĉina Enciklopedio.

Post tio, multaj fakuloj de la

ĉinaj kulturaj rondoj komencis la penigan kompiladon. Por kompili enciklopedion necesas ne nur normaj scioj, sed ankaŭ trafaj ekplikaĵoj pri ili. Tial tiuj fakuloj laboris konsciencie kaj faris ĉion eblan por atingi pli altan nivelon. Ĉiufoje, kiam la Redakta Komisiono decidis fakan strukturon, ĝi devis fari revizion 7-8 fojojn kaj prove verki 3-4 manuskriptojn de ĉiu fako. Pri la artikolo “misilo” en la volumo de “Militaj Aferoj”, s-ro Qian Xuesen (Ĉjan Ŝjuesen), fama fakulo de sistema inĝenierio, multfoje diskutis kun aliaj. Profesoro Yuan Longping, “patro de hibridigita rizo”, foj-refoje plurlis la artikolon “hibridigita rizo” en la volumo “Agrikulturo”. Nemalmultaj kompilantoj de la enciklopedio devis konsulti



S-ro Mei Yi (la dua de maldekstre) kaj liaj kolegoj en diskutado pri eldonado

centon da libroj por skribi artikolon kun malpli ol 500 ĉinaj ideogramoj. El la 74 volumoj de "Granda Ĉina Enciklopedio" krom la volumo "Astronomio", kiun oni kolektive kompilis 26.5 monatojn, la kompilado de granda parto de aliaj volumoj daŭris 5-6 jarojn. La laboro pri la volumo "Ĉina Kulturo" daŭris ok jarojn kaj tiuj de "Biologio" kaj "Moderna Medicino" 10 jarojn respektive. Oni eĉ uzis 12 jarojn por kompili la volumon "Ĉina Historio".

La jaroj hardis la junulojn kaj grizigis la harojn de mezaĝuloj. Iuj maljunaj kompilantoj forpasis antaŭ ol aperis la enciklopedio. Fama arkeologo Xia Nai (Ŝja Naj) reviziis siajn artikolojn por

la enciklopedio antaŭtagmeze, sed neatendite, li enhospitaliĝis posttagmeze. Post lia forpaso oni trovis ĉe lia lito multe da materialoj por la enciklopedio. Juristo Chen Tiqiang (Ĉen Tiĉjang) forpasis, reviziinte en sia malsanula lito la artikolojn pri internacia juro kun centoj da miloj da ĉinaj ideogramoj. En tiuj 15 jaroj forpasis 32 el la 110 membroj de la Redakta Komisiono. Nun aperis "Granda Ĉina Enciklopedio", kaj ĉinoj por ĉiam memoros tiujn, kiuj oferis sian vivon por la enciklopedio.

La aparteco de "Granda Ĉina Enciklopedio" kuŝas en tio, ke oni ne aranĝis la artikolojn laŭvice de A ĝis Z, sed laŭ la fakoj kaj laŭ unuaj literoj en kombino.

Ĉiu fako posedas sian sistemon. Enhave la enciklopedio donas al la legantoj ĉefe riĉajn sciojn pri Ĉinio kaj materialojn unufoje publikigitajn, kaj krome, ĝi donas ankaŭ materialojn pri aliaj landoj. Ekz., en la volumo "Aeronaŭtiko kaj Astronaŭtiko" oni detale traktas pri la raketo, aviada tekniko de la antikva Ĉinio. La fakoj de "Granda Ĉina Enciklopedio" plejparte traktas materialojn unufoje aperintajn en Ĉinio, kaj estas la unua fojo, ke ĉinoj sisteme resumis la fundamentajn sciojn kaj sukcesojn de tiuj fakoj. La fakoj pri natura scienco kaj inĝenierio konsistigas 56% de la totala nombro de la fakoj en la enciklopedio. Tio estas senprecedenca kaj manifestas, ke la moderna tempo donas grandan atenton al sciencoj kaj teknikoj.

Post sia apero "Granda Ĉina Enciklopedio" estas atentata kaj admirata de la mondaj akademiaj rondoj. Japana instruitulo diris, ke ĝi defias la enciklopediojn de la mondo. Nun s-ro Mei Yi, ĉefredaktoro de la Eldonejo de la Granda Ĉina Enciklopedio, jam havas novan planon, t.e. resumi spertojn por prepari sin al la dua eldono de "Granda Ĉina Enciklopedio" en la komenco de la venonta jarcento. ■

Horaro de ĉiutaga Esperanta disaŭdigo de Ĉina Radio Internacia

(ekde novembro 1993)

Universala Tempo	Regiono	Ondoj (m)	kHz
20.00-20.30	Eŭropo	40,16	7470
		40,51	7405
		30,11	9965
22.30-23.00	Latin-Ameriko	31,65	9480
		26,05	11515
11.00-11.30	Japanio, Koreio	43,13	6955
		31,65	9480
13.00-13.30	Sudorienta Azio	25,75	11650
		25,34	11340

Adreso: Esperanto-Sekcio de Ĉina Radio Internacia, Fuxingmenwai Dajie, CN-100866 Beijing, Ĉinio

Horaro de ĉiutaga Esperanta disaŭdigo de Pola Radio

(ekde oktobro 1993)

Universala Tempo	Regiono	ondoj (m)	kHz
14.30-14.55	Eŭropo	25,39	11815
		31,45	9540
		31,50	9525
		48,90	6135
21.30-21.55	Eŭropo	41,99	7145
		48,90	6135
		50,04	5995
		200,00	1503

Adreso: Pola Radio, Esperanto-Redakcio, 00-950 Varsovio, P.O. Box 46, Pollando

Universala Tempo antaŭe nomiĝis Grenviĉa Meza Tempo. Detalaj informoj pri ĉiutagaj elsendoj haveblas ĉe ambaŭ radiostacioj. Bonan aŭdeblecon!

Taktiko de Sun Wu

de HOU JUELIANG

“**M**ILITA Arto de Sun Wu” verkita de fama milita strategiisto de Ĉinio Sun Wu en la 6-a jc. a.K. estas la plej frua verko pri militaj aferoj en la mondo. Tradukite en plurajn lingvojn, la verko levis en iuj landoj tajdon de la studo kaj praktikado. Oni raportis, ke en iu lando fondiĝis ĉ. cent studsocietoj pri “Milita Arto de Sun Wu”, kaj studentoj de komerca altlernejo legis la libron kun admiro, kaj iuj ofte parkerigas ĝin.

Ĉu ne estas mirinde, ke studentoj de komerca lernejo parkerigas la verkon, kiu temas nur pri milito, sed neniuj vorto estas pri komercado?

Ĉi tie estas konsekvenco: “Milita Arto de Sun Wu” estas plena de signifaj sentencoj kaj enkorpiĝas la taktikon de la aŭtoro. Lia taktiko estas konsultinda ne nur por komando de milito (oni raportis, ke dum la golfa milito iuj generaloj havis ĉe si la nomitan verkon), sed ankaŭ por administrado de entreprenoj kaj komerca konkurenco. Ĉiuj homoj povos ĉerpi el la verko edifon, taktikon kaj fariĝi saĝaj.

Sentimaj komandantoj sen taktiko ne povas venki. Sun Wu ĉiam donis grandan atenton al la milita arto.

Sun Wu opiniis, ke oni devas trakti malamikon per taktiko por eviti militon, kiam ĝi ne eksplodis. Li diris, ke milito estas granda afero por la socia paco kaj armea sekureco, kiu “ĉiutage konsumas

nekalkuleblajn monsumojn”, terure suferigas la popolon, tial oni ne devas ventkape provoki militon. Li opiniis, ke komandantoj ne devas provoki atakon en kolero kaj ekscitiĝo. Venki la malamikon sen milito estas bona rimedo, dum konkero per peza damaĝo de propraj trupoj estas malbona rimedo. Sun Wu opiniis, ke oni devas havi potencan armeon kiel apogilon, interparoli kun la malamiko, malakordigi la malamikan tendaron, multigi por si simpatiantojn, fari politikan kaj diplomatian ofensivon, por ke la malamiko retiriĝu.

Sed kion fari, se la malamiko obstine persistas en atako, kaj la batalo estas neevitebla? Sun Wu opiniis, ke oni devas fari kuraĝan rezistadon, kaj proponis serion da taktikoj kontraŭ la atako por gajni la militon.

Sun Wu diris, ke oni devas “scii la malamikon antaŭ milito”, kaj venki blindecon en komandado. Kiel oni povos “antaŭscii”? Unu el la ĉefaj metodoj de lia taktiko estas “klare informiĝi pri la malamiko kaj agi en ĝusta ŝanco”: Unuflanke oni devas semi malakordon inter la malamikaj trupoj, ke homoj de la malamiko donu sekretajn informojn; aliflanke sendi spionon al la malamiko, ke li rekte akiru detalajn informojn pri la forto, ekspedicia linio, dispozicio de la trupoj, municio, provianto kaj animstato de la armeoj de la malamiko. Estas fama sentenco de Sun Wu: “Oni estas ĉiamvenka, kiam li bone konas sin mem kaj la malamikon.” Li diris, ke oni ne povas

venki, se li scias sin mem, sed ne la malamikon. El tio oni povas vidi, ke oni devas “bone koni sin mem kaj la malamikon” ne nur en milito, sed ankaŭ en la komerca konkurenco kaj aliaj laboroj.

Bone koninte la malamikon, oni devas fari ankaŭ sufiĉan ideologian kaj materialan preparon por la milito. Oni ne faru militon sen preparo. Sufiĉa preparo ĉiam garantias nevenkeblecon. Sun Wu pledis por posedi iniciativon sur la batalkampo, konduki la nazon de la malamiko por ke la malamiko agu laŭ nia volo, sekve de tio ni povas esti en nevenkebla pozicio, dum la malamiko en la pasiva. Oni devas havi bonan taktikon en la ĝenerala strategia problemo, “malhelpi malamikon sed ne esti malhelpata de ĝi”.

En milito komandantoj de ambaŭ flankoj konkuras per saĝo kaj penas superruzi la kontraŭulon kaj peli tiun en senelirejon. Por milito oni ne refuzas trompon, tio estas trajto de milito deantikleve. Por trompi malamikon, Sun Wu proponis finton, fari multajn falsajn fenomenojn, ŝajnigi sin malforta kaj retiriĝonta, por ke la malamiko ne povu scii la verajn situaciojn, venu al erara konkludo kaj faru eraron en agado kaj komandado.

En kampanjo Sun Wu staris por kaŝi efektivajn fortojn, fari sekretan manovradon, okupi strategian lokon, precipe altejojn por venka batalo. Li diris, ke ŝtono sur ebenejo montras sin senforta. Sed kiam ĝi ruliĝas de montpinto, ĝi havas mortigan forton. Li diris ankaŭ, ke akvo fluanta sur ebene-

jo ne montriĝas potenca, sed kiam ĝi torentas, ĝi forportas ŝtonon. Estas same por trupoj. Kiam la trupoj okupas altajn lokojn, ili povas ataki kiel ŝtono kaj akvo falantaj de alta loko.

En atako oni devas eviti fortan alon kaj ataki la malfortan de la malamiko, surprizataki la malamikon dum ĝia senpreteco, koncentri siajn elitajn fortojn por breĉi la defendon kaj fini batalon kiel eble plej rapide. La loko zorge defendata de la malamiko estas malfacile konkerebla, do oni ne ataku ĝin. La malforta alo estas malmulte defendata kaj facile konkerebla. Por ataki malamikon, ekstreme grave estas koncentri siajn trupojn. Oni devas sieĝi kaj

ekstermi la malamikon per trupoj 3-4-oble aŭ eĉ 10-oble pli multaj ol tiuj de la malamiko. La taktiko de "eksterma batalo" estas admirata deantikve. Mao Zedong ja aplikis tiun arton en la 30-40-aj jaroj de la nuna jarcento kaj gajnis la revolucion militon. Tre famaj estis la bataloj komanditaj de Mao Zedong per tiu taktiko. Li diris, ke estas prefere ekstermi unu divizion ol venki dek diviziojn; rompi unu fingron ol vundi la dek fingrojn. Vundo de dek fingroj ne estas timinda por la malamiko, ĉar vundo povos esti kuracita. Sed post rompiĝo de unu fingro, la malamiko havas nur 9 fingrojn. La taktiko de eksterma batalo estas observinda ne nur por milito,

sed ankaŭ por aliaj laboroj. La homaj energio kaj vivdaŭro estas limigitaj, sed oni devas fari multe da aferoj. Se oni distranĉos sian tempon por fari jen tion jen ĉi tion, nenio rezultos el lia penado. Do estas preferinde koncentri la tempon kaj energion, preni la plej ĉefan aferon por finfari ĝin. Kiam oni plenumis la unuan aferon, li komencu la duan. Tia aranĝo estas preferinda.

Ŝanĝiĝemaj estas la situacioj de la kampanjo, kaj ambaŭ militantaj flankoj ofte ŝanĝas siajn strategian dispozicion kaj taktikon. En la ŝanĝiĝintaj situacioj, komandantoj de armeo ne devas sin kateni de la antaŭa taktiko, sed devas sin adapti al la ŝanĝiĝantaj situacioj. Por tio Sun Wu elmetis la taktikon: venki malamikon konforme al ties kondiĉoj. Li diris, por milito ne estas fiksa modelo, same kiel akvo, kiu ne havas fiksan formon. Kiu povas ĝustatempe ŝanĝi sian taktikon laŭ la ŝanĝiĝo de la situacioj kaj gajni militon, tiu estas milita geniulo. Li atentigis, ke la komandantoj devas zorge observi ŝanĝigon sur la batalekampo. Efektive ĉio estas ŝanĝiganta, ne nur milito. Ĉiuj homoj troviĝas en ŝanĝiĝo de la labormedio, laborkondiĉoj kaj homaj interrilatoj. Kiam ŝanĝiĝas la reala stato, oni devas ŝanĝi ankaŭ sian penson por gajni venkon en la ŝanĝiĝo. Se tiele, oni ja posedas la esencon de "Milita Arto de Sun Wu".

Ne ekzistas rozo sendorna. Ne ĉiu vorto en "Milita Arto de Sun Wu" estas observinda. Ekzemple la verko ekskluzive akcentas rapidan finfaron de milito kaj neas necesan longedaŭran militon. Tio ja estas malaprobinda. Cetere la aŭtoro preferis mistifiki la soldatojn, ke la soldatoj bezonas scii nur batalon. Li rigardis la soldatojn kiel obeemajn ŝafojn. En senelirejo la soldatoj fariĝis viktimoj por rigida atako al malamiko, kiam ili devis fari mortan batalon: "Oni postvivis eĉ mortan situacion." Tio ja estas malĝusta. ■



Sentencoj de Xunzi

Homoj povas mamsuĉi tuj ĉe la naskiĝo, kaj oni devas diri, ke tio estas homa instinkto. Sed filozofo Xunzi (313-238 a.K.) argumentis per tio, ke la homa naturo estas malbona, ke la homoj estas egoismaj kaj avidaj jam ĉe la naskiĝo. Li opiniis, ke la malbona naturo de la homoj detruas la pacon de la socio, kaj oni devas ŝanĝi la malbonan naturon de la homoj per la konfuceanisma doktrino.

Ĉasi famon estas pli malbone ol ŝteli.

La homoj ofte eraras en kompreno pri la vero pro miskompreno de unu konkreta afero.

Ne ĉagreniĝu pro la pasinteco, nek timu la estontecon, sed agu tuj en la ĝusta tempo.

Sen peno putran branĉon oni ne povas derompi, sed danke senĉesan penadon ŝtonon kaj metalon oni povas trabori.

Sen grimpi altan monton oni ne povas scii la altecon de la ĉielo; sen iri en profundan riveron oni ne povas scii la dikecon de la tero.

Vintro ne ĉesas venadi, malgraŭ ke la homoj timas froston. La tero ne malgrandiĝos, malgraŭ ke la homoj sentas maloportunecon pro la vasteco de la tero.

Neaŭdo taŭgas malpli ol aŭdo, aŭdo — malpli ol vido, vido — malpli ol scio, scio — malpli ol ago.

MEM PROUVU

Kiel purigi la ekranon de televidilo?

Post uzado de certa tempo la televidila ekranon estas kovrita de polvo. La polvo enhavas solidajn grajnoj de silicia oksido. Purigado per lavtuko aŭ papertuko postlasas sur la ekranon nevideblajn skrapspurojn, kiuj disigas la lumradiojn kaj malklarigas la televidan bildon.

Per peco da kotono trempita en alkoholo, vi povas ronde viŝi la ekranon de la mezo ĝis la rando. Tio bone efikas. Ĉar la streĉforto de alkoholo donas puŝan forton al la polvo.

Kiam la libro malsekiĝis...

Se vi metas malsekigitan libron en sunra-

dioj, la libro ŝrumpiĝos kaj flaviĝos. Vi povas ebenigi la malsekan libron kaj frostigi ĝin en fridujo. Post du tagoj la libro fariĝos ebena kaj bonorda kiel antaŭe.

Terapio kontraŭ presbiopeco

Maljunulo suferis de presbiopeco kaj renkontis multajn malfacilojn en la ĉiutaga vivo. Poste li lernis de aliaj la terapion: Rigardante rekte, turni la okulglobojn dekstren trifoje kaj poste maldekstren trifoje, poste fari masaĝon por la orbitoj. Ĉiutage li faris tion dufoje. Kelke da jaroj poste lia presbiopeco multe mildiĝis kaj li povis legi sen presbiopaj okulvitroj.

Legi sen presbiopaj okulvitroj

Kiam maljunulo bezonas legi ion, ekzemple malgrandajn literojn de uzindikoj de medikamentoj, sed ne kunportas presbiopajn okulvitrojn, li provu jenan rimedon: trapiki paperon per pinglo kaj legi tra la trueto la malgrandajn literojn.

NOVAJ TENDENCOJ EN KONSUMADO

Lastatempe komerc-informa oficejo de Ŝanhajo faris sintezan esploron kaj konstatis, ke aperis novaj tendencoj en konsumado de la ĉinaj urbanoj kaj kamparanoj. La tradicia konsumado en la kamparo — konstrui domojn por siaj gefiloj — jam iom post iom cedis al aĉetado de hejmaj elektraj aparatoj kaj veturiloj. Kaj la urbanoj, kiuj elspezis ĉefe por hejmaj elektraj aparatoj dum longa tempo, nun kredeble elspozos grandan monsumon por loĝdomo.

En la lastaj jaroj kun la leviĝo de la vivnivelo de la kamparanoj, sufiĉe multe da kabanoj en la kamparo estis anstataŭigitaj per novaj domoj. Nun la kamparanoj jam ne tiel multe bezonas konstrumaterialojn, ilia aĉetpovo de koloraj televidiloj, fridujoj k.a. leviĝas jaro post jaro. Enketo diras, ke 100 milionoj el la 220 milionoj da kamparanaj familioj de Ĉinio ne havas televidilon, nek magnetofonon, kaj en ĉemaraj ekonomie progresaj vilaĝoj iuj familioj jam anstataŭigis la malnovajn elektrajn aparatojn per grandekrana kolora televidilo, altklasa fridujo, aŭdia aparato k.a.

Kontraste al tio, la urbanoj iom post iom dediĉas pli grandan atenton al loĝdomo. Pli kaj pli multaj urbanoj aĉetas loĝdomon anstataŭ ĝin lui kaj entuziasmas pri ĝia dekoraciado. Tio plene montras la intereson de la urbanoj pri loĝdomo. Nun la urbanoj ne plu kontentiĝas pri granda areo de la loĝdomo, sed dediĉas plenan atenton al beligo, komfortigo kaj vivetoso de ĝia medio. Oni kompare multe elspozas por dekoracii siajn kuirrejon, tualetejon kaj salonon, kaj ornamaĵoj en ilia apartamento elspiradas elegantecon, antikvecon kaj belecon. Dura kemifibra tapiŝo kaj plastaj ledplanko kaj brikoj kaj aliaj malaltklasaj kaj mezklasaj materialoj ne plu estas ŝatataj, sed lignaj plankplatoj, koloraj kaheloj, marmoro, granito, altklasa tapiŝo estas pli kaj pli bonvenaj en la urboj.

En la altkonsumanta tavolo de la urbanoj, nemalmultaj aĉetis videoregistratoron, telefonon, luksan aŭdioaparaton, telediskan aparaton k.a., tamen ili estas malpli multaj ol tiuj, kiuj fervoras en la domdekoraciado.

Fakuloj opinias, ke ŝanĝiĝo de la tendencoj en la konsumado de la urbanoj kaj kamparanoj montras, ke la ekonomia reformado en Ĉinio jam en sufiĉe granda skalo influas kaj ŝanĝas la konsuman koncepton de la urbanoj kaj kamparanoj.

NOVAJ ATINGOJ EN HIBRIDIGO DE RIZO

Lastatempe Zhou Guangqia (Ĝou Ĝuangĉja), prof. de la Biologia Instituto de la Normala Universitato de Hunan, kiu okupiĝas pri teoria studo de semo-kulturado kaj eksperimentado de kulturado de hibridigita rizo dum multaj jaroj, gvidante siajn helpantojn, elkulturis per kemia reguliĝo ordinaran kerno-sterilan rizon, kiu spikiĝis kaj fruktis. Tio markas, ke la teoria studo de hibridigita rizo de Ĉinio kaj ĝia eksperimenta tekniko atingis la avangardan nivelon de la mondo.

En la komenco de la 70-aj jaroj Yuan Longping kaj aliaj ĉinaj agronomoj unuafoje solvis la malfacilon en "utiligo de la supereco de la hibrida rizo", elkulturis hibridigitan rizon kompletigitan de tri linioj en granda areo da kampoj kaj riĉe rikoltis. Post tio Yuan Longping prezentis novan projekton — kulturi hibridigitan rizon kompletigitan de du linioj. En 1988 la Esplora Centro pri Rizhibridigo de Hunan elkulturis "bonajn semojn kun lum-sentiva sterila genaro Annong S-1" por hibridigo de du malsamaj specioj. Pro la nova specio de la hibridigita rizo la produktokvanto pliiĝis en granda proporcio.

Kun la supre menciita kulturado de hibridigita rizo de du linioj paralele iras alia metodo, t.e. elkulturi aŭ restaŭri masklan sterilecon per iuj kemiaĵoj. Tiu metodo povas solvi la problemon pri pura kuniĝo kaj kreskigo de ordinara kerno-sterila specimeno, kaj plie estas stabila la funkcio de la kulturataj semoj, simpla ĝia aplikado en la produktado kaj sendanĝera ĝia disvastigo. Tiu hibridigo kun kerna sterileco kiel la bazo estas rigardata de fakuloj kiel la plej supera metodo.

Dank' al siaj esplorado kaj ripetada eksperimento en teorio kaj eksperimentaj metodoj, prof. Zhou kaj liaj helpantoj fine selektis nombron da kemiaj receptoj kaj medikamentoj kun originala efiko. Helpate de prof. Yuan Longping, en marto de 1993 oni rikoltis la unuan sukceson en aplikado, ke grupo da ordinaraj kerno-sterilaj specimenoj de rizo, ricevinte medikamenton, mirinde spikiĝis kaj fruktis. El la maturiĝintaj spikoj oni trovis spikon kun 27 grajnoj.

Nun en la Biologia Instituto de la Normala Universitato de Hunan oni povas vidi, ke la duagrupa sterila rizo, sterkita de prof. Zhou per kemia reguliĝo, bone kreskas. La spikoj kun diversaj etiketoj jam pleniĝas per grajnoj. Inter ili estas la sukcese replantita rizo kaj sterila rizo kulturita per la specioj de la unua generacio sukcese akiritaj per kemia elkulturo.

Amikeco inter homoj kaj tigroj

EN 1974 mia trimembra familio vivis en forstejo de nordorienta Ĉinio. Tiam Shanshan*, mia 5-jara filino, deziris kateton aŭ hundeton, sed ambaŭ malfacile troveblis tie.

Iutage de frua somero, apenaŭ mi revenis de laboro, ŝi haste tiris min eksteren por kune rigardi hundon. Ni iris al pino en arbaro kaj ŝi klinis branĉojn de arbedo por montri la hundon. Ah, miaj kruroj tremis. Ĝi ne estas hundo, sed nordorienta tigo kun nigraj strioj sur la korpo. Ĝia kapo, granda kiel tiu de bovo, kliniĝis inter la antaŭaj kruroj. Ĝi duonfermis la okulojn, kaj ĝiaj lipharoj longas je 10 cm. Shanshan eĉ apogis la tigran kapon sur sia ŝultro kaj kombis ĝiajn dorsajn harojn per sia maneto, dirante: "Mi plurfoje trinkigis ĝin. Ĝi malsatis kaj soifis." La tigo iom malfermis la okulojn kaj ĝemis kun lipoj tremantaj. "Rigardu, panjo! Ĉu ĝi malsaniĝis?" La tigo kvazaŭ komprenis ŝin kaj atendis kun fermitaj okuloj. Mi vidis, ke ĝi ne atencas nin, kaj trankviliĝis iomete. Sed mi ne malstreĉiĝis kaj diris al mia filino: "Tuj venu. Mi kuracos ĝin." Feliĉe, malsaniĝis la tigo, alie la rezulto estos neimagebla.

Mi tiris la filinon hejmen, ĵus kiam mia edzo revenis de laboro. Mi rakontis la okazaĵon al li, kiu tuj sekvis min, kun ĉas-pafilo al la pino. Li levis la pafilon dirante: "Mi mortigos ĝin." En tiu momento la filino subite kuris al la tigo kaj brakumis ĝin je la

kolo, kriante: "Panjo, ĉu vi ne promesis kuraci la malsanon de mia hundo?" Vidinte la filinon, mia edzo devis demeti la pafilon. La tigo suferis bovlograndan furunkon sur la kokso, kaj ulcera osto jam vidiĝis. Mi malfermis la medicinan keston, injektis sedativon al ĝi por ĝin kvietigi, poste antisepsis ĝian vundon per alkoholo kaj enfrotis midicinaĵon en ĝin.

Ĉiutage mi kuracis ĝian malsanon. Du monatojn poste, ĝi resaniĝis. Ni ne volis, ke ĝi foriĝu de ni. Ni nomis ĝin "Huihui". Mia edzo ofte ĉasis leporon por ĝin nutri. De tiam Huihui fariĝis la plej bona amiko kaj gardanto de Shanshan. Tage ĝi ludis kun ŝi, nokte ĝi silente ripozis en ŝtona nesto surmonte. Komence la arbohakistoj de la forstejo vidis Huihui, kun granda timo. Sed vidante ke la knabineto gaje ludis kun ĝi, ili ege miris, iom post iom trankviliĝis kaj eĉ grupe venis al mia hejmo por ĝin rigardi. Huihui tre ŝatis petoli kun Shanshan, iam per sia dika vosto pelis ŝin antaŭen, iam lasis ŝin rajdi sur ĝi, kio ridigis ŝin ĉiufoje.

Iun aŭtunan nokton Huihui iris en forston kaj ne revenis en la sekvanta tago. Shanshan ploris: "Mi sopiras ĝin. Sen ĝi mi ne kuragas ludi sola eksterdome." Laŭdire, aŭtuno estas la pariĝa sezono de tigroj. Ankaŭ tigroj volas havi familion!

Matene de la sekvanta printempo, nelonge post kiam la filino iris eksteren, ŝi ĝoje rekuris hejmen kaj diris al mi: "Huihui re-

venis!" Mi haste iris kun ŝi al la pino, sub kiu senmove kuŝis la tigo. Mi palpis ĝin kaj konsciis, ke ĝi jam mortis. Inter ĝiaj fleksitaj kruroj estas tigrido en grandeco de kato, kun brilaj okuloj kaj flava hararo. Ĝi pene mamsuĉis. Ĝi estis multe pli bela ol ĝia patrino.

Ni portis hejmen la tigridon, kiun ni nomis poste "Huahua", kaj nutris ĝin per trinkaĵo farita el faruno, sukero kaj laktopulvoro. Ĝi kreskis sane. Ni ŝatis amuziĝi kun ĝi. Iam ĝi sin kaŝis, iam saltis alten, iam sin ĵetis por kapti ion. Du jaroj pasis, ĝi fariĝis granda.

Baldaŭ venis la tago, kiam Shanshan devis viziti lernejon. Tiutage ŝi, akompanate de sia patro, iris al la lernejo. Sed Huahua ŝin sekvis survoje. Ĝi ne volis foriri malgraŭ nia insultado. Mi devis brakumi ĝin, ĝis la aŭtobuso kun Shanshan kaj ŝia patro veturis foren. Ĝi tuj malĝoje kuŝiĝis apudvoje kaj rifuzis reveni hejmen. Shanshan revenis posttagmeze. Ekvidinte ŝin, ĝi sin pafis al ŝi kaj saltetadis ĉirkaŭ ŝi, kun levitaj kapo kaj vosto. Ekde tiam Huahua ĉiutage akompanis Shanshan al la lernejo kaj returne.

Foje, Shanshan kaj ŝia patro kune kun Huahua ĉasis surmonte. Li forkonsumis la pafaĵon dum pafado de gazelo. Ĝuste kiam Huahua persekutis la vunditan gazelon, granda nigra urso moviĝis al Shanshan. Vidante tion, mia edzo tre maltrankviliĝis. En la kriza momento Huahua rapide sin ĵetis sur la dorson de la urso

Kuraco de junula miopeco

de QIN GANG

CIUJ miopuloj suferas de maloportuno, tamen gejunuloj suferas de miopeco ĉefe pro la laciĝo de okulaj muskoloj kaj perturbo de miozo kaj midriazo. Ĉi-sube mi konigos tri metodojn por kuraci la junulan miopecon, nome, masaĝon de koncernaj akupunkturaj punktoj, rigardadon de kandellumo kaj prenadon de kontraŭmiopa pocio. La miopaj junuloj povas provi unu el ili aŭ la tri metodojn samtempe. Ili estas efikaj por kuraco de la junula miopeco.

A. Masaĝo de akupunkturaj punktoj

Premu kaj knedu laŭvice la akupunkturajn punktojn *ĝingming*, *tongziljaŭ*, *ĉengĉji*, *jangbaj* kaj *bajhuj* po ĉ. 100 fojoj. Masaĝu 20-25 minutojn.

La masaĝo povas glatigi ĝinglŭo-vojojn, akceli la cirkuladon de sango kaj vitala energio kaj plibonigi liveradon de sango al vi kaj ilian nutritecon por normaligi kaj levi la vidkapablon.

Vidu la bildon.

B. Rigardado al kandellumo

Sidu rekte en malluma ĉambro, kurbigu viajn genuojn je 90 gradoj. Metu lumantan kandelon je unu metro antaŭ vi, samnivele kun viaj okuloj. Fiksu vian rigardon sur la lumo, ĝis vi klare vidos ĝin. Tio daŭros ĉ. 30 minutojn.

Movu la lumantan kandelon

je du metroj for de la okuloj kaj daŭrigu vian rigardadon. Kiam vi klare vidas ĝin, anstataŭigu la lumantan kandelon per brulanta incenso. Rigardu la incenson, ĝis vi klare vidos ĝin.


Faru tion ĉiuvespere antaŭ via enlitiĝo. Ĉiu seanco daŭras 10 tagojn.

La rigardado de la kandellumo povas eksciti la okulglobojn, pligrandigi la kapablon de la okulaj muskoloj, reguligi la funkcion de la optikaj nervoj por levi la vidkapablon de la okuloj.

C. Prenado de kontraŭmiopa pocio E

La pocio estas farita el licio, lotussemo, jujubo, ignamo kaj aliaj ĉinaj medicinaĵoj. Ĝi estas tonika al la hepato kaj renoj kaj utila por glatigi ĝinglŭo-vojojn kaj reguligi la vitalan ekvilibron de la homa korpo por levi la vidkapablon.

Ĉiutage prenu la pocion miksi-



Akupunkturaj punktoj
1. Ĉengĉji 2. Tongziljaŭ
3. Jangbaj 4. Bajhuj
5. Ĝingming

tan kun mezvarma bolinta akvo du-tri fojojn, ĉiufoje po 15 mililitroj. Se vi prenas ĝin 20 tagojn, do via vidkapablo fariĝos kompare bona; se vi prenas ĝin 60 tagojn, la rezulto estos pli kontentiga. La pocio estas produktata de la Farmacia Limigita Kompanio de Nanning, Guangxi-a Ĝuang-nacia Aŭtonoma Regiono, Ĉinio. Ĝi baldaŭ vendiĝos en- kaj eksterlande. ■

kaj forte mordis ĝian orelon. La urso kriadis pro la sufero kaj penis por forskui Huahua de sia dorso. Ĝi ruliĝis surtere kaj faligis Huahua. Ĉi tiu kuris ĉirkaŭ la urso, muĝadis kaj mordadis ĝin. La laca urso sin returnis kaj tuj forkuris anhele. Kaj Shanshan estis savita.

En 1978, antaŭ ol ni transloĝiĝis en Pekinon, ni pensis pri la tigrido. Ni interkonsiliĝis kaj decidis donaci ĝin al la provinca

akrobatika trupo. Venis aŭto kun fera kaĝo, kien mi kondukis Huahua. Oni ŝlosis la kaĝon. Komence Huahua estis gaja, sed kiam la aŭto ekmoviĝis, Huahua blekis maltrankvile. Neatendite, post sep tagoj la trupo redonis al ni la tigridon, dirante: "En la provinca ĉefurbo la tigro ĉiam larmis, eĉ ne manĝis bovviandon. Ĝi fastis kvar tagojn kaj ne povis teni sin sur la piedoj. Se ni daŭre restigos ĝin, ĝi certe mortos." La tigrido jam ne havis forton por

stari antaŭ ni kaj nur ĝoje svingetis la voston. Mi tuj nutris ĝin per bovlo da lakto, post tio ĝi ŝanceliĝe stariĝis. Ĝi resaniĝis post du semajnoj dank' al nia bona prizorgado. Ni decidis sendi ĝin al la naturo, por ke ĝi libere vivu.

Antaŭvespere de nia transloĝiĝo ni kondukis Huahua al la antaŭurbo. Kiam ĝi persekutis leporon, ni ŝtele foriris. ■

*Shanshan nun studas en la Harbin-a Universitato en nordorienta Ĉinio.



La Ĉina Virina Korbopilka Teamo gajnis la arĝentan medalon en la 25-aj Olimpiaj Ludoj en 1992.

ZHANG QINGZHEN:

Ĉinaj korbopilkestinoj en progreso

DANK' al sia penado dum multaj jaroj, la Ĉina Virina Korbopilka Teamo akiris novan progreson. En la 25-aj Olimpikoj en Barcelono, 1992, la ĉinaj knabinoj gajnis la subĉampionecon en korbopilka ludo kaj kreis novan rekordon en la historio de la korbopilka ludo de Ĉinio. Julie de 1993, en la Monda Studenta Sportkunveno okazinta en Kanado, la Ĉina Virina Korbopilka Teamo venkis la kuban teamon kaj gajnis la oran medalon.

Antaŭe la lud-nivelo de la Ĉina Virina Korbopilka Teamo estis kompare malalta. La progreson rikoltis korbopilkaĵaj trejnistoj kaj sportistinoj, dank' al sia penado generacio post generacio. En 1983 la ĉina teamo unuafoje partoprenis la mondan ĉampionecon konkurson kaj gajnis la trian lokon. En 1984, en la 23-aj Olimpikoj ĝi refoje gajnis la trian lokon. En la Azia Virina Korbopilka Ĉampionecon Konkurso la ĉina teamo trifoje gajnis la ĉampionecon kaj kvinfoje la subĉampionecon de post 1976. Tio montris, ke la Ĉina Virina Korbopilka Teamo enviciĝis inter la unuaj tri fortaj teamoj de la mondo. Tamen pro diversaj kaŭzoj ĝi ne firme tenis sian sukceson kaj poste la distanco inter ĝi kaj fortaj teamoj de la mondo plilongiĝis,

kaj iam ĝi estis venkita de la teamo de la Respubliko de Koreio en la azia konkurso.

En 1991, la novan virinan korbopilkan teamon de Ĉinio komencis gvidi s-ro Li Yaguang, ekskorbopilkestisto de la Ĉina Vira Korbopilka Teamo. S-ro Li difinis al si la celon: progresigi la ĉinan virinan teamon, por ke ĝi enviciĝu inter la fortaj teamoj de la mondo. Li opiniis, ke nun la taktiko de la virina korbopilka ludo de la mondo disvolviĝas en la novan etapon, t.e. en matĉoj antagonismo fariĝas pli kaj pli forta. En Usono, la korbopilka regno, la virina korbopilka ludo fariĝas pli kaj pli intensa. La ĉina teamo devas firme teni tiun tendencon kaj formi sian propran stilon rapidan, bravan, ekzaktan kaj viglan en matĉo. Nur tiamaniere ĝi povas akiri idealan sukceson.


Tamen dum longa tempo en la matĉoj la ĉina teamo dependis de sia mezavanulo Zheng Haixia (Ĝeng Hajŝja), 2.04 metrojn alta. En ĉiuj gravaj matĉoj ŝi devis ludi plenajn 40 minutojn. Se ŝi estis anstataŭigita, la forto de la teamo tuj malgrandiĝis. Kiam s-ro Li Yaguang komencis gvidi la teamon, la sanstato de Zheng estis ne tiel bona kiel antaŭe. Laŭ s-ro Li, ĝuste tiu taktiko kaŭzis la postĝintecon de la ĉina teamo. Li opinias, ke ĉiuj membroj de la teamo devas vigli sur la ludkampoj

kaj ĉiu el ili devas gajni poentojn.

Sub la gvido de s-ro Li, la ĉina teamo faris streĉan vintran trejnado. En la trejnado s-ro Li dividis la teamon en du grupojn. Unu ludis kiel defendanto, kaj la alia kiel atakanto. Tiu aranĝo faris ĉiun membron ĉefludanto. La knabinoj de la ĉina teamo sin trejnigis tage kaj kunvenis por resumado vespere. Ili aranĝis sian tagordon tiamaniere: Tute sen feriotagoj, ili vivis kolektivon vivon en manĝado, aĉetado, amuzado, lernado kaj celebrado de siaj naskiĝtagoj. Kiu malobservis la regularon, estis kritikata.

Post duonjara preparado, la juna ĉina teamo partoprenis en la Monda Studenta Sportkunveno okazinta julie de 1991 en Britio. Tio estis testo por la nova ĉina teamo. En la sportkunveno la ĉina teamo partoprenis en ok matĉoj kaj s-ro Li partoprenigis ĉiujn membrojn en ĉiuj matĉoj ĉu kun kompare malfortaj teamoj, ĉu kun la usona, Sovetunia kaj aliaj fortaj teamoj. Escepte de Zheng Haixia, kiu vundis sian talion, ĉiuj aliaj 11 knabinoj viglis sur la ludkampo. En la duonfinalo la ĉina teamo estis venkita de la usona kaj en la matĉo por la kupra medalo ĝi estis venkita de la kanada teamo. Fine la ĉina teamo gajnis la kvaran lokon. Pri tiu rezulto s-ro Li kaj la membroj de la

Ĉina korbopilistino (dekstre) en konkurso



ĉina teamo estis tre malkontentaj. Tamen oni sciis, ke laŭ la tiamaj kondiĉoj de tiu teamo ja estis bone por ĝi gajni la kvaran lokon en la mondskala konkurso partoprenata de fortaj teamoj.

Tiufoje sur la ludkampo vidiĝis pli da ĉinaj knabinoj, kiuj ludis pli rapide, kaj montriĝis la kolektiva forto kaj obstineco en la ludo. La ĉina teamo profunde impresis la rigardantojn.

Unu el la gravaj celoj de la trejnado por la ĉina teamo estas intensigi sian defendan forton. La ĉina teamo faris tenacan kaj elastan defendludon en la studenta sportkunveno kaj akiris bonajn rezultojn. Ĝi sukcese aplikis la defendan taktikon en la matĉoj kun la usona kaj ĉeĥa teamoj. Ĝenerale, en la matĉo kun aliaj teamoj la usona teamo akiris 90-100 poentojn, je almenaŭ 20 poentoj pli multe ol la rivalo, tamen ĝi multfoje faris eraron en la matĉo kun la ĉinaj sportistinoj pro ties sukcesa defendo kaj estis preskaŭ kuratingita de la ĉinaj knabinoj. La ĉeĥa teamo tre malfacile ludis en la matĉo kun la ĉinaj knabinoj pro ties defendo kaj iam en kvin minutoj gajnis neniun poenton.

La konkursoj malkovris ankaŭ la malfortajojn de la ĉina teamo. La malavantaĝo en la konkuro por pilko rezultanta de la korbobalado akompanis la ĉinan teamon jam de longe. La manko estis tre evidenta ankaŭ en la ĉi-foja konkurso. Sole en unu matĉo de la konkurso la ĉinaj sportistinoj konkurakiris pilkon rezultantan de la korbobalado je 100 fojoj malpli multe ol la usonaj. Por akiri tian pilkon necesas havi fortan korpon kaj strebadon. Ĝenerale, tuj post enĵeto de la pilko, la ĉinaj sportistinoj sin retiras malantaŭen, dum tiuj de aliaj fortaj teamoj tuj sin ĵetas sub la korboretan post la enĵeto. Tio estas alia manko de la ĉina teamo. El tio vidiĝas, ke oni devas doni grandan atenton al la konkurakiro en trejnado.

La ĉina teamo trovis sian latentan forton kaj ankaŭ sian malfortajon en la konkurso. Ĝi faris penigan trejniĝon kaj ankaŭ partoprenis internaciajn konkursojn, en kiuj ĝi bone hardis sin. En la azia ĉampioneca konkurso ĝi plurfoje venkis la teamon de la Respubliko de Koreio. En internacia konkurso ĝi venkis fortajn teamojn de la mondo, inkl. tiun de Sovetunio. Ĝi plene montris sin en la duonfinalo de la 25-aj Olimpikoj. La ĉina teamo, kiu gajnis la naŭan lokon en la Monda Virina Korbopilka Ĉampioneca Konkurso, venkis la kuban teamon per 109:70, dank' al siaj rapida atako, aktiva konkuro kaj trafa enĵeto. Pro tio ĝi gajnis la rajton partopreni en la finalo de la 25-aj Olimpikoj.



La knabinoj de la Ĉina Virina Korbopilka Teamo bone scias, ke ilia sukceso estas jam notita en la historio. Pli malfacila tasko prezentiĝas antaŭ ili. Por teni sian lokon inter la mondaj fortaj teamoj ili ankoraŭ devas fari multon. ■

Sporta lernejo en

La Shichahai-a Sporta Lernejo de Pekino estas grava lernejo por kulturaj junaj sportistoj. 35 jarojn post sia fondiĝo, ĝi elkulturis grandan nombron da elstaraj sportistoj, el kiuj multaj partoprenis en mondaj konkursoj.


En la lernejo funkcias kursoj de tabloteniso, gimnastiko, piedpilko, uŝu-o, flugpilko, halterlevo, ĵudo, lukto kaj volanludo. En la lastaj jaroj perfektigis instalaĵoj de la lernejo kaj multiĝis ĝiaj instruistoj, tiel ĝi fariĝis ampleksa faka lernejo por geknaboj.

Ambaŭ estas seriozaj.





Ekzercado

Novaj lernantinoj



Pekino

Fotoj de LIU SIGONG




Sur piedpilka ludkampo



Trejnado

En gimnastejo



EKONOMIO

● En 1993, kiam la ekonomio de multaj landoj kaj regionoj dronis en depresio, la totala jara produktovaloro de Ĉinio superis 3 000 miliardojn da juanoj, je 13% pli multe ol tiu en 1992.

● En la 90-aj jaroj Ĉinio investos pli ol 700 miliardojn da juanoj por konstrui 400 grandajn kaj mezgrandajn trafikajn instalaĵojn. Post la plenumo de tiu plano, la totala longo de fervojoj de Ĉinio atingos 70 000 kilometrojn, tiu de la ŝoseoj — 1.2 milionojn da kilometroj, la nombro de profundakvaj ankrejoj de la marbordaj havenoj atingos pli ol 600, la transporta tubaro longos 25 000 kilometrojn kaj la jara transporta povo de la civila aviado kreskos je almenaŭ 10 milionoj da homoj ĉiujare.

● En 1993 la totala valoro de komerco inter Ĉinio kaj la Eŭropa Komunumo pli multe kreskis ol tiu en 1992 kaj la lasta fariĝis la kvara granda komerc-kunlaboranto de Ĉinio.

Ĉinio preparas sin por pligrandigi komercadon kun la Eŭropa Komunumo kaj estas preta plibonigi la kvaliton de produktaĵo kaj pakumo, plimultiigi specojn de varoj kaj doni pli da servoj. Ĉinio esperas, ke pli multe da produktaĵoj de la Eŭropa Komunumo eniros en la merkaton de Ĉinio.

KULTURO

● Dramo en malgranda teatro originis en Okcidento kaj enkondukiĝis en Ĉinion komence de la kuranta jarcento. Lastatempe ĝi denove ekviglis en Pekino. En 1993, kiam okazis foiro de dramoj, 14 tiaj dramoj prezentigis antaŭ la publiko. Iuj el ili montris artan provadon, kaj aliaj temis pri la reala vivo. La teatro entenis sume 200 rigardantojn. La aktoroj kaj rigardantoj facile kunfandis siajn sen-

Sceno el la dramo "Amo de Geedzj"



tojn, tial la arto estis ŝatata de pekinanoj. "Amo de Geedzj" estis prezentata de la Vulpa Teatro el kelkaj junaj artistoj. Ĝi temas pri geedziĝo kaj amafero. En la dramo la geedzj dronis jen en dolĉa rememoro, jen en kontraŭdiro kaŭzita de am-konflikto. Tiam la rigardantoj kvazaŭ sidis ekster la fenestro, subaŭskultis ilian flustradon kaj dividis kun ili ĝojon kaj malĝojon.

● Antaŭ nelonge, la Ĉina Wuqiao(Uĉjaŭ)-akrobatika Mondo, 300 kilometrojn sudoriente de Pekino, malfermiĝis al turistoj. Ĝi kovras areon de 200 hektaroj kaj estas granda amuzejo por turismo, konkurso, aĉetado k.a. Nun la turistoj povas viziti tie la akrobatikan mirindejon, magian halon, kulturan urbon, akrobatikan amuzejon kaj akrobatikan hotelon. La turisma flughaveno, besta dresejo, lago de sovaĝaj bestoj k.a. estas konstruataj kaj post nelonge estos malfermitaj al vizitantoj.

● Dum la elektado de la linioj de la Ŝanhaj-Nankina kaj Ŝenyang-Dalian-a Ekspresaj Ŝoseoj, dank' al uzado de la grandskala mapo desegnita de mapodesegna fako, la du linioj mallongiĝis 60 kaj 40 kilometrojn respektive kaj ŝpariĝis miliardo da juanoj. Pro aplikado de aviada topografio kaj satelitaj fotoj, la linio de la Elektrizita Datong-Qinhuangdao-a Fervojo mallongiĝis 50 kilometrojn kaj ŝpariĝis miloj da muoj (15 muoj egalas al 1 hektaro) da kampoj.

Laŭ nekompleta statistiko, Ĉinio jam eldonis pli ol 2 000 specojn da mapoj, ĉ. 1.8 miliardojn da ekzempleroj.

● Antaŭ nelonge, en Xi'an (Ŝji'an) fondiĝis la Ŝaanxi(Ŝenŝji)-a Instituto pri Libro de Ŝanĝiĝoj, la unua en Ĉinio. La ĉefa tasko de la instituto estas profundigi la studadon pri la tradicia trezoro de Ĉinio "Libro de Ŝanĝiĝoj" kaj servigi ĝin al la socio. Nun Japanio kaj Usono jam servigas ĝin al ekonomio kaj komerco.

● Antaŭ nelonge, la valora artaĵo ŝtona tuĉinkujo Spirito de Drakoj estis farita de ok ŝtataj majstroj post trijara skulptado. La purpura tuĉinkujo estas 3.4-metre longa, 2.2-metre larĝa, 1.2-metre alta kaj 8-tune peza. La ĉefa parto de la skulptaĵo estas drakoj kaj la Granda Muro, kiuj simbolas la spiriton de la ĉina nacio. La 56 drakoj simbolas la unuiĝon de la 56 nacioj de Ĉinio. La artaĵo markis, ke la fabrikado de tuĉinkujoj en Ĉinio atingis novan nivelon.

● Antaŭ nelonge, ekfunkciis en Pekino kinejo kun ringa ekrano, la unua de Azio, en la Ĉina Scienc-teknika Domo. La diametro de la kinejo estas 27 metroj. Dum projekciado de filmo la rigardantoj uzas la lenson en fiŝokula formo kaj sentas la bildojn ekster sia vidkampo. En la malfermo la japana filmo "Granda Kanjono" kaj aliaj estis admirataj de la rigardantoj.

MEDICINO

- Por preventi poliomjeliton en Ĉinio oni imunigas ĉiujn infanojn en aŭ sub aĝo de kvar jaroj. Tio estas senpaga preventado por la nova generacio kaj estas ankaŭ granda afero en la higiena historio de Ĉinio kaj la mondo post kiam malaperis variolo en Ĉinio.

De nun ĝis januaro 1995, kiam poliomjelitaj virusoj malfacile disvastiĝas, en Ĉinio oni dufoje ĉiujare faras poliomjelito-preventadon por plifortigi poliomjelitoimunan kapablon de la infanoj kaj rapide ĉesigi la cirkuladon de virusoj en la naturo kun la celo malaperigi poliomjeliton en la tuta mondo en la jaro 2000, kiun difinis la Monda Sana Organizo.

- La kuracado de leŭkemio en Ĉinio estas avangarda en la mondo. Ekzemple, la Ĉina Kunlabora Grupo por Kuraci Leŭkemion per Vitaminoacido A, kiun organizis Ruijin(Ĵujĝin)-hospitalo kaj Sangologia Instituto de Ŝanhajo, efike kuracis pli ol 700 suferantojn, kiuj konsistigis 85-90% de la kuracitoj. Iuj kuracitoj povas plu vivi sep jarojn.


SCIENCO KAJ TEKNIKO

- D-ro Chen Zhaoxiong (Ĉen Ĝaŭŝjong) kreis la plej altan rekordon de transdonado de ĉina intelekta proprieto: la uzrajto de unu teknologio efikas por dek jaroj kun pago de 24.44 milionoj da usonaj dolaroj.

D-ro Chen funkcias kiel estro de la Centro por Maŝintradukado de la Komputera Instituto sub la Ĉina Akademio de Sciencoj. En sep jaroj li kreis la teoriant sistemon pri la intelekta maŝintradukado kaj havigis al la mondo la unuan artefaritan intelektan maŝintradukatoron. Ĝi estas granda kiel manplato. Nun oni liveras 1 000 tiajn aparatojn al la mondo ĉiutage.

- En junio 1993 la Asociada Komputera Grupo de Ĉinio kreis la unuan mikrokomputeron 586 kaj per tio Ĉinio envicigis inter la landoj, kiuj posedas avangardajn teknikojn de mikrokomputero. Tia komputero, kun la plej alta funkcio en la sfero de komputeroj de la mondo, estas unu el la produktaĵoj, kiujn la okcidentaj evoluintaj landoj malpermesas eksporti al Ĉinio.

- Aplikante altajn teknikojn, profesoro Jiang Shougui (Ĝjang Ŝoŭguj) plibonigis la metabolan funkcion de kokino, kio ebligis al la kokino plene asimili energion de la nutraĵo kaj kiel eble plej multe enigi



Kuracistino trinkigas al infano poliomjelit-imunan medicinaĵon.

ĝin en la ovojn, tiel ke la ovoĵo enhavas ultraenergion.

NATURPROTEKTADO

- La 20-an de novembro 1993, en la Ĉina Centro por Protekti Grandajn Pandojn en Wolong-rezervejo de Sichuan-provinco naskiĝis pando, kio estas miraklo de la mondo pri la vintra naskiĝo de pando en la historio de kreskado de grandaj pandoj.

La loko, kiel la plej granda rezervejo de grandaj pandoj de Ĉinio, estas unu el la bazoj, kie oni kulturas grandajn pandojn. De 1986 oni naskigis ok pandojn.


- Elafuroj (*Elaphrus davidionus*) vivis en la malsupra baseno de Yangzi-rivero en Ĉinio. Pro la troa ĉasado ili preskaŭ malaperis. Nun post 7-jara bredado en la naturo en Dafeng-gubernio, Jiangsu-provinco, la nombro de elafuroj, raraj bestoj de la mondo, kreskis de 39 al 154. Ĉinaj kaj alilandaj fakuloj opinias, ke la unuafoja bredado de elafuroj en la naturo sukcesis en Ĉinio.

RELIGIO

- La ĉefa tasko por ripari Potala-palacon en Tibeto estis restitui la oran pinton de la pagodo de Dalai-lamao la Sepa. La restituado finiĝis en la 17-a de novembro 1993.

En la pasintaj pli ol unu jaro Ĉinio riparigis la orajn pintojn de la pagodoj de Dalai-lamaoj la Oka, la Naŭa kaj la Dektria. Atakite de vento, pluvo kaj sunlumo en pli ol 200 jaroj, la ora pinto de la pagodo de Dalai-lamao la Sepa malhele brilis kaj la ligno estis putriĝinta. En la ĉi-foja restituado oni aplikis plej kompleksajn teknikojn kaj uzis plej multe da tempo kaj materialoj. Krom novtipa ligna strukturo, oni uzis ankaŭ pli ol 150 kilogramojn da oraj kaj kupraj lamenoj.

Bambuaj de Shengxian-



Bubalo

Teksto de XU HUADANG
Fotoj de LIU SIGONG

CINOJ lertas en bambua plektado en multaj lokoj de antikve. Arkeologiaj materialoj montris, ke la prahomoj plektis korbon el bambuo por konservi mangaĵojn. Tradicio diras, ke en la periodo de Militantaj Regnoj (475 — 221 a.K.) vivis lignaĵisto Tai Shan, kiu kreive aplikis lignaĵistan teknikon en la bambua metio, dank' al kio la metio impete disvolvigis. Hodiaŭ la ĉinaj bambu-plektistoj daŭre rigardas Tai Shan kiel iniciatoron de la bambuplekta metio.

Shengxian-gubernio situas en Zhejiang-provinco, orienta Ĉinio. Ĝi, honorita kiel hejmo de bambuoj, meze de la 4-a jc. jam estis landfama pro siaj belaj bambuaj plektaĵoj. La tieaj metiistoj povas plekti rondan ventumilon el tre delikataj bambuaj fadenoj. Tia ventumilo, maldika kaj diafana kiel cikadaj flugiloj, estas multe ŝatata de la publiko. Komence de Song-dinastio (960 — 1279) en Shengxian aperis multaj metiistoj de lanterno. Ili faris grandajn drakoformajn lanternojn kun framo el bambuo, kiuj pli vigligis la etoson de festotagoj. En la dinastioj Ming (1368 — 1644) kaj Qing (1644 — 1911) pli kaj pli multaj homoj de la loko okupis sin per bambuplektado.

Multaj ĉiutagaj bezonaĵoj estas konservataj en bambuaj korboj de diversaj formoj. Oni faras bambuajn korbojn rondajn, ovalajn, kvadratajn kaj ortoparalelepipedajn por teni donacojn, ŝuojn, bombonojn, fruktojn, mangaĵojn, florojn k.a. La plektometodoj estas diversaj: eltiro, krucigo, surpremo, afurigo k.a. La bambuaj strioj estas tiel delikataj; ke unu bambua fadeno dikas 0.25 milimetron. Iuj delikataj bambuaj korboj estis garnitaj per latunaj akcesoraĵoj.

Bambuaj korboj de la gubernio estas tre popularaj en la loko, kaj ĝuas renomon eksterlande. En la

lastaj jaroj metiistoj aplikis novan teknologion de bambua plektado. La plej menciindaj estas kolordesegnado sur bambuaj lamenoj kaj ilia blankigo.

Oni enigas la kolordesegnitajn bambuajn lameojn meze aŭ ekstreme de florvazoj kaj korboj por fruktoj. Se oni faros orajn desegnojn sur la lamenoj, la plektaĵoj fariĝos pli belaj. Oni ankaŭ blankigas la bambuajn lamenojn por ke tiuj fariĝu blankaj kaj brilaj, el kiuj la faritaj metiartaĵoj estas pli ĉarmaj.

Metiistoj de bambuaj plektaĵoj kaj koncernaj teknikistoj de la gubernio faras bestojn el bambuo. Tio malfermis novan mondon por la bambuplekta metio. La eksponejo de la loko estas mondo de bambuaj bestoj: Pigo staras sur ruĝa umearbo, pavo pavas sub verdaj arboj, pando manĝas bambuŝojn, en la aero flugas diversaj birdoj kaj sur la planko kuras multspecaj bestoj.

En 1979 la bambua aglo de Shengxian flugis en la Blankan Domon de Usono, kaj estis ŝatata de prezidento Carter de Usono. En 1982 eksponiĝis bambua aglo en fluga pozo en la monda foiro, Tenezio. Ĝi plaĉis al milionoj da vizitantoj.

Por pliigi la uzeblecon de la metiartaĵo, la metiistoj faras la tradiciajn bambuajn korbojn bestformaj, ekz. koka korbo, anasa plado, striga skatolo k.s. Iuj birdformaj bambuaj ujoj kun alte levitaj flugiloj, kiuj funkcias kiel tenilo, estas tre allogaj.

Inter la amasego da bambuaj plektaĵoj vidiĝas ankaŭ Naŭ Leonoj kun Pilko, Du Drakoj kun Globo, Ĉaro kaj Ĉevaloj el la tombo de la Unua Imperiestro de Qin-dinastio (221-206 a.K.).

La bambuaj plektaĵoj fariĝis pli kaj pli famaj. Nun ili vendiĝas ne nur en Ĉinio, sed ankaŭ en Japanio, Usono, Italio, Germanio, Singapuro kaj aliaj 80 landoj kaj regionoj. Oni diras, ke ili estas artaj trezoroj de Oriento. ■


plektaĵoj gubernio



Du drakoj amuziĝas per globo.

Feino Kiosko





ISSN 0032-4361

En taj-a vilaço

Foto de LIU SIGONG



世界语《中国报道》一九九四年第三期
(本刊代号: 二——九一五) 国内统一刊号: CN11 1339/G2